

ESPERANTO

INTERNACIA REVUO ESPERANTISTA

N-ro 513-4

JULIO-AUGUSTO 1948



ALEKSIS KIVI

SEP FRATOJ

Klasika verko el la fora nordlando.

Ekkonu la animon de la finna popolo per ĉi tiu bela traduko en vigla, kolorplena lingvo.

Romano kun la tuta ĉarmo de popolkanto.

360 paĝoj.

Prezo : bindita 16 ŝil. 6p., broŝ. 13 ŝil., aŭfranko 6p.

Eldonita de

ELDONO VILHO SETÄLÄ, HELSINKI.

Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo



ANONCETOJ

Kosto : du pencoj por ĉiu vorto, aŭ internacia respondkuponon por ĉiu duo da vortoj.

Fr. Svačina, Lanžhot, Ĉeĥoslovakujo, koresp. kun tuta mondo pri jenaj temoj : (1) Bredado de senkornaj kaprinoj, laŭ plej moderna metodo. (2) Pri tuta homa vivo de naskiĝo, ne nur ĝis morto.

Don Kihoto de la Manĉo, literatura ĉefverko hispana, aĉete dezirata en ĉiuspecaj eldonoj fremdlingvaj, ankaŭ en Esperantaj fragmentoj. Ofertoj al UEA-Peranto, D-ro R. Zaballos Morales, Fray Marcos (Florida), Urugvajo.

Libro por korespondemuloj senpage. Informoj kontraŭ poŝtrespondkuponon. Cerri, Esperanto-servo, Postal casella 89, Varese, Italujo.

Ne-Katolikoj, kiuj deziras informojn pri la katolika religio povas ricevi ilin senpage de la Internacia Katolika Informejo, Fraterhuis, Loonopzand, Nederlando.

Muziko per Esperanto. Ludi pianon post 3 monatoj, vidu la anoncon sur kovrilpaĝo 3.

Kelkaj gejunuloj deziras korespondadon. Skribu al S-ino Björk, Iisvesi, Finnlando.

24-jara studento de pedagogia akademio deziras korespondi kun la tuta mondo. S-ro Herbert Nolting, (23) Bremen, Stolbergerstr. 13, U.S. Zone, Germanujo.

Agentfimo Vendado, Spåldingsgatan 3, Gotenburgo, Svedujo. Fondita 1935. Telegrafadreso : Vendado. Kodo : A.B.C. 7a eldono. Telefono : 18 53 75. Banko : Skandinaviska Banken, Gotenburgo. Delegitoj de "Esperanto kaj Komerco". Reprezentantoj de komercistoj kaj fabrikistoj en diversaj landoj. Akceptas proponojn por ekskluziva agentado en Svedujo. Agentejo de Svedujo por Internacia Komerco - Unio. Importistoj kaj eksportistoj.

Fraŭlino Geneviève Perrier, "Petit Moulin", Montendre (Charente-Maritime), Francujo, 18-jara, deziras interŝanĝi poŝtkartojn kaj eble leterojn kun ĉiulandaj geesperantistoj.

Poŝtmarkojn interŝanĝi kun ĉiuj landoj deziras Mirek Galuška, Uhersky Ostroh, Ĉeĥoslovakujo. Korespondas Esperante kaj germane.

Poŝtmarkojn deziras interŝanĝi tutmonde, Ron Dobbs, 212 Southesk Road, Forest Gate, London, E.7, Anglujo.

Deziras interŝanĝi neuzitajn poŝtmarkojn en serioj kun ĉiuj landoj. Sendu kvanton kaj vi ricevos la saman. Respondo garantiata. S-ro C. Yang, 11 Kungpei Street, Tientsin (8), Ĉinujo.

Berlin-Frohnau (Germanujo). S-ro Walther Gieseler, Forstweg 79, 1., pk., p.i, k. ĉ. 1., precipe pri natursciencoj, biologio.

Esperanta Unio de Liberalaj Religianoj deziras interrilati kun Modernistoj, Unitarianoj, kaj Liberalaj Kristanoj. Informo havebla ĉe S-ro W. E. Reeve, 32 Hillcourt Road, London, S.E.22, Anglujo.

Vjekoslav-Bošnjak, Slav. Orahovica, Jugoslavujo, deziras interŝanĝi pk. il. kaj pm. kun ĉiuj landoj. Ĉiam respondas.

Buĉisto deziras korespondadon kun buĉistoj, porkbuĉistoj, bovbredistoj, porkbredistoj ĉiulandaj. Stevens, 12 Vogelslaan, Bosvoorde, Belgujo.

Ano de ĉambro de komerco volas korespondi kun alilandaj anoj pri la konduko kaj celoj de iliaj ĉambroj. S-ro R. Trickey, 275 Ewell Road, Surbiton, Anglujo.

23-jara poŝtisto deziras korespondi tutmonde kun gesamideanoj per ilustritaj poŝtkartoj, ankaŭ interŝanĝi poŝtmarkojn. Skribu al S-ro T. K. Tulonen, Hirvenluoto, Finnlando.

Juna fotografistino deziras korespondon kun la tuta mondo ; interŝanĝas fotojn, librojn, il. poŝtkartojn. Skribu al Ilse Gross, Berlin-Rahnsdorf, Grünheider Weg 19, Germanujo.

Nova grupo (Westbourne) en la 1949a kongresurbo en Britujo aranĝas poŝtkartvesperon en Septembro. Skribu amase al S-ro J. W. Chambers (Sekretario), "Kvar," Elm Grove, Parkstone, Bournemouth, Anglujo. Nepre respondos.

Korespondos pri moderna abelkulturo—Pain, 62 rue Saint-Placide, Paris 6, Francujo.

Norvega Esperantista Ligo, Box 942, Oslo, serĉas informojn pri sia honora membro, Cseh-instruisto D-ro Ottmar Fischer, Hungaro el Debrecen, poste loĝinta en Kiel, Germanujo.

Jan Hornik, Pošumavská ĉis. 9, Bedrichov, P. Jihlava 2, Ĉeĥoslovakujo, interŝanĝas pm. kun ĉiuj landoj.

Deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj, egalan kvanton, Jaime Vives, José Cuxart 56, Cornellá, Llobregat, Barcelona, Hispanujo.

17-jara studento deziras korespondi kun ĉiuj landoj. Jan Loub, Tri Studue u Nového Města na Mor, Ĉeĥoslovakujo.

PREMAJ ROMANETOJ

"La libreto entenas 23 mallongajn rakontojn, kiuj estas premiataj en literatura konkurso. La romanetoj, tre diversaj en temo kaj stilo, estas originale verkitaj en Esperanto. Pro la interesa enhavo kaj bona lingvo la libro tre taŭgas kiel ekzerca legaĵo por kluboj, studrondoj, kaj perfektigaj kursoj."

La Praktiko, Marto 1948.

96 paĝoj. Prezo : 2ŝ. 8p. aŭ 11 rpk. aŭ frankite.

Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo.

LA MILITO ESTAS FOR !

Tamen ĉiutage katastrofoj minacas vin !

FRANCA ESPERANTISTA

enketas . . .

Se vi jam spertis ian kataklismon aŭ mortdanĝeran situacion, bonvolu ĝin rakonti por la legantoj de la supre nomita gazeto. **(Nepre ne verku pri militaj okazaĵoj).**

Se eble aldonu fotojn kliŝegeblajn.

Respondoj adresotaj ĝis la 31a de Decembro 1948 al

FRANCA ESPERANTISTO

(Oficiala organo de
Unuiĝo Esperantista en Francujo)

34 rue de Chabrol, Paris 10, Francujo

Specimenon de la gazeto kontraŭ du int. rpk.
Jarabono por eksterlando 350 fr. frankoj.

ESPERANTO

INTERNACIA REVUO ESPERANTISTA

41a JARO Julio-Aŭgusto 1948
N-ro 513-4 (7-8)

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio

Fondinto :
H. HODLER

Redaktoro :
HANS JAKOB

Helpredaktoro
- MASON STUTTARD

Ĉion por la redakcio sendu al
ESPERANTO
Palais Wilson, Genève, Svis.

Ĉion pri administrado de UEA
kaj de la revuo ESPERANTO,
abonado, reklamoj, anoncetoj
sendu al

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth
Herts., Anglujo

Jara abono : 8 ŝil. anglaj
(kun membreco kaj jarlibro
12ŝ. 6p.)

Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en
multaj landoj

Tarifo por reklamoj :

1 paĝo - £5 anglaj
½ paĝo - 50 ŝil. anglaj
¼ paĝo - 25 ŝil. anglaj
⅓ paĝo - 12.5 ŝil. anglaj

Anoncetoj pri korespondado :

2 pencoj por unu vorto aŭ
1 int. respondkupono por ĉiu
duo da vortoj

Legantoj en 65 landoj

LA 33a KONGRESO — MALMÖ, 1948

La kongreso finiĝis, vivu la venonta ! Ĉiuj partoprenintoj memoras la belan kongresfinon en Berno, la transdonon de la kongresflago al la svedaj amikoj, ŝargitaj organizi la tridektrian. Rapide pasis la jaro kaj jam oni sin preparas por sekvi la vokon el la nordo. Malgraŭ la sennombraj nunaj komplikaĵoj pri veturado, sin anoncis tamen pli ol 1400 kongresanoj kaj oni rajtas kalkuli je 1600 aliĝantoj. Ĉi tiu kongreso certe estas norda, t.e. la partopreno skandinavia superas laŭnombre. Ĝi tamen estas *internacia* ĉar partoprenas anoj el 30 landoj !

Sen la du militoj la nunjara manifestacio Esperantista estus la 44-a internacia kongreso, kaj en 1954 la 50-a. Antaŭ kvardek jaroj okazis la kvara en Dresden kaj el la fama *Kvaro por la Kvara*, la tiama loka kongres-komitato, ankoraŭ vivas nur samideano Karl von Frenckell. En la sama jaro fondiĝis U.E.A. kaj okazis la unua kunveno de U.E.A.-anoj, kunveno signanta la vojon de la nova Asocio.

Kun la tempo ŝanĝiĝis ankaŭ la aspekto de niaj kongresoj. Ĝis 1914 la movado dependis de aliaj faktoroj ; ĝi estis individueca. La kresko kaj la graveco de la movado aŭtomate senigis la kongresojn je diskutobjektoj, kiuj nun estas prilaborataj plejparte de ekzistantaj organoj, iuj honoraj, iuj salajrataj. Tio estas natura evoluo, konstatebla en ĉiu alia klopodado. Klarvidaj samideanoj frue strebis doni al la ĉiujara kunveno Esperantista ian karakterizon ; kaj tio estis feliĉa ideo de Edmond Privat starigi Someran Universitaton, kiun efektivigis la 17-a Kongreso en Ĝenevo 1925. Malmö revivigas ĉi tiun ideon sub iom alia formo. La kongres-programo ja estas promesplena kaj multrilate superas tiun de la 32-a. Oni povas jam nun diri kun certo, ke Malmö ne nur promesas, sed inde plenumos !

Rigardante la longan liston de niaj kongresoj ni facile konstatas, ke la plimulto okazis en Centra kaj Okcidenta Eŭropo. Plej oriente kaj sudoriente estis la kongresoj de Varsovio kaj Budapeŝto. Dume Esperanto floradas en la balkanaj landoj, precipe en Bulgarujo kaj Jugoslavujo, kie nia lingvo ne estas afero de *studintaj* homoj, sed de la simpla popolo. Ni devos iam kunveni en tiuj landoj por kuraĝigi niajn aktivulojn kaj doni impulson al ilia laboro. *Kie estas la volo, ekzistas ankaŭ la vojo* estu nia respondo al eventualaj *neeble*-oj.

H.J.

ESPERANTISMAJ PROBLEMOJ

V.—La Statistiko

Goethe en siaj konversacioj kun Eckermann iam diris: *Oni asertas, ke nombroj regas la mondon, sed tion mi scias tutcerte, ke nombroj montras al ni, ĉu ĝi estas bone aŭ malbone regata!* Ĉi tiun diraĵon oni citas kiam oni parolas pri la valoro de statistiko. Por koni ion ĝisfunde, necesas *faktoj kaj ciferoj*. Dokumenti precize, tio estas necesaĵo por ĉiu respondeca aganto.

La statistiko de la Esperanto-movado estis pli malpli afero de la hazardo aŭ de momenta entuziasmo de ciferamanta samideano. Sed nenio pli! Ni aldonu, ke statistikado estas laboro kontinua, senglora, kaj ni ne troigas dirante, enuiga. Oni ŝatas rezultatojn, sed malkonas la genezon kaj sintezon.

Se ni nun revenas en niaj *Problemoj* per ĉi tiu, tio estas pro la antaŭvido, ke ni iam bezonos klarajn ciferojn pri kelkaj *elementoj* de nia agado. Unufoje ni entreprenis grandstilan statistikadon, okaze de la 40-jara jubileo de Esperanto. Tio estis la popolnombrado Esperantista, kiun organizis kaj direktis Profesoro Dietterle en Leipzig. Alia *regula* statistikado konkluda estis la Bibliografia resumado de aperintaj verkoj en Esperanto, farita ĝis la jaro 1934. Provo de *probabla* kalkulo pri la aperintaj lernolibroj por Esperanto estis entreprenita kaj la rezultato presita en la Jarlibro de U.E.A. 1937. Ĉi tiujn du lastajn statistikojn starigis kaj plenumis la verkinto de ĉi tiu artikolo, kiu sin multe okupis pri teorio kaj praktiko de ĉi tiu branĉo.

Ne forgesinda estu la regula kalkulado de la servoj de U.E.A. (servoj plenumitaj de la Delegitoj). Ĝi tamen estas nura kunmeto de ciferoj, sen la tiom necesa prilaboro laŭ interna valoro. Iuj Landaj Asocioj faras regulan kalkulado de okazintaĵoj Esperantaj, ekzemple de kursoj, nombro de partoprenantoj k.t.p.

Sufiĉe pri tio, kio estis! Ni konstatu, kion ni devos fari de nun por ke estontece ni povu respondi al "Kiom?" per konkretaj kaj pruveblaj ciferoj.

Kion ni kalkulu statistike?

Kio estas statistikinda en nia movado? Ne indas ke ni kunigu ciferojn kiujn ni ne bezonas. La okulfrapa kalkulado estas la nombrado de la *popolo* Esperantista, kaj la plej ofta demando farata al ni ja estas ĉi tiu *Kiom da Esperantistoj ekzistas en la mondo?*—demando neniam precize respondebla. Oni povus antaŭvidi tian *popolnombradon* bazinte sin sur la spertoj de la

unua, eble por la centa datreveno de la naskiĝo de D-ro Zamenhof.

Por la nuna tempo la Esperantisma statistiko devas limiĝi al jenaj sciindaĵoj: 1. Kursoj, 2. Aperintaj libroj, 3. Plenumitaj servoj. Aliaj eroj de nia klopodado, indaj je statistika esplorado, ne ekzistas.

Tekniko de la statistiko

El la tri cititaj eroj, la unua meritas la plej gravan atenton. Ni neniam povis prezenti regulan, ĝustan kaj precizan elmontron de la okazintaj kursoj tutmonde. Hodiaŭ la teknika laborado estas plifaciligita per la unueca organizaĵo.

La laboron pri la statistiko de la kursoj devas plejparte plenumi la Landaj Asocioj kaj nur tie, kie tio ne ekzistas, aŭ kie ĝi ne bone funkcias, U.E.A. mem entreprenu senpere la laboron. Ni precizigu tuj, ke temas pri kompara statistiko laŭlanda, do internacia, ĉar alia ne havas sencon.

Starigis demando, ĉu ni entreprenu tian statistikon nur elementan aŭ tre rafinitan. Tio signifas, ĉu ni kalkulu la okazigon de kurso kun nombro da lernantoj kiuj finis ĝin, aŭ ĉu ni ampleksigu la enketon je subtilaĵoj. Ekzemple, pri la karaktero de la kurso (elementa, lerneja, plenkreskula k.s.) pri la konsisto de la kursanoj (aĝo, profesio, tendenco) pri uzo de lerniloj kaj kiaj, pri oficiala subteno k.t.p.

Rekonante niajn rimedojn, kaj financajn kaj personajn, ni devas nin limigi al la plej necesa. Sekvas el tio, ke estu starigata bone pripensita demandaro, kies ĉefaj eroj estu samaj por ĉiuj landoj. Landa Asocio kun ioma gravo povos aldoni pliajn demandojn laŭbezone.

La plej grava parto tamen estas la prilaboro. Kiom da demandaroj por enketoj ja falas sur la homojn, kaj kiom malmulte rezultas ofte el ĉi tiu demandado ĉar la materialo restas neprilaborita en registrejo aŭ en aktoŝranko? Tion ni neniel imitu, nia tempo estas tro altvalora.

Ĉiu Landa Asocio devus krei tian Statistikan Servon, t.e. ŝargi komitatanon aŭ aktivulon, kiu ŝatas tian laboron, per la kolekto de la informoj kaj ilia prilaboro. Unuavide, tio prezentiĝas kiel giganta afero. Fakte, ĝi ne estas, se oni dediĉas al ĝi kelkajn horojn ĉiusemajne. La finan laboron plenumos la Centro, ĉu la Oficejo en Rickmansworth, ĉu tiu en Genevo, aŭ eĉ en alia loko. Ne necesas, ke ĉi tiu laboro estu finplenumita en oficejo.

La plia laboro konsistas el la regula informado de kursestroj al la enlanda centro. Kiel tio okazas, estas detalo nenormigebla, ĉar ĝi dependas de enlandaj cirkonstancoj. Ian normon oni devas antaŭvidi. Je dato fiksita, la nombroj estu komunikataj sur pretaj formuloj al la Statistika Centro. Tiu kunigas ilin poste laŭlande kaj laŭ la specialaj rubrikoj same fiksita. Kaj fine oni povus regule informi en la revuo *Esperanto* pri la finsumoj kun eventualaj konkludoj. Post du aŭ tri jaroj kaj sur la bazo de la donitaj informoj la estro de la statistika servo faros siajn esplorojn kaj konstatojn laŭ donota plano.

Ĉefa kondiĉo estas, kaj ni tion ripetas ankoraŭfoje: Reguleco, metodeco kaj persisto. Jen en kelkaj linioj la ĉefaj ideoj de tia regula statistikado de la kursoj. En ĉi tiu afero nature partoprenu nia lingva kunfrato Sennacieca Asocio Tutmonda.

Pri la aliaj eroj statistike esplorataj, ni diru nur, ke ilin devas kaj povas plenumi nur la Centro, ĉu Rickmansworth (servo de la Delegitoj) ĉu Ĝenevo (aperintaj libroj). La tekniko estas tute alia, la amplekso ankaŭ senteble pli malgranda.

Por kompletigi la antaŭajn liniojn servu jena skemo de *kompleta demandaro* pri la Esperantaj kursoj. El ĉi tiu skemo la leganto konstatos kiom vasta estas la materialo.

Skemo

1. Loko : Jaro :
2. Kurso (Elementa, progresiga, supera) Substreku tion kio taŭgas
3. Organizita de kiu ?
4. Kursestro
5. Oficiala subteno, kiaforme ?
6. Komenco de kurso..... Fino de kurso.....
7. Nombro de kursanoj ?.....je la fino!.....
8. Uzita lernolibro aŭ metodo.....
9. Kurso pagita ? Kiom ?.....Senpage ?.....
10. Kiom da kursanoj aliĝis al la loka grupo ?.....
11. Loko por pliaj utilaj informoj.....

Loko kaj dato : Subskribo :
Nomo de la Landa Organizaĵo :
(Presita aŭ per stampilo)

Jen koncize la ĉefaj ideoj pri regula statistikado de nia ĉefa agado—la kursoj. Ni submetas ĝin al la prijuĝo de la Landaj Asocioj kaj de la Esperantistaro. Eble dum la venonta kongreso oni povus pridiskuti ĝin.

H. J.

Se multaj samideanoj sin turnos al la Fakoj de Turismo en Kajro kun peto pri gvidlibro, la Direktoro de tiu fakoj promesis eldoni belan ilustritan prospekton en Esperanto. Nepre skribu en Esperanto kun eventuale la nacia lingvo. Skribu al: M. le Directeur Général du Département du Tourisme, 1 rue Baehler (Kasr-el-Nil) Le Caire, Egiptujo.

ESPERANTO KAJ RADIO

Redaktas S-ro A. C. Oliver, 120, Heronsgate Road, Chorleywood, Rickmansworth, Anglujo, al kiu oni sendu senescepte ĉion pri tiu rubriko

Mallongigoj : I=Informoj, P=Parolado, K=Kurso

Ĉiutage	15.30–15.45	Praha. 1935m. kaj 31.41m. I.
	17.15–17.30	Paris. 41.21m. Radio-diffusion Francaise, Emissions espérantistes vers l'étranger, 118 Champs-Élysées, Paris 8.
	21.00–21.15	Praha. 31.41m. P.
Dimanĉo	15.00–15.15	Sveda Radio. 19.80m. kaj 27.83m. I. pri la 33a Universala Kongreso. (Nur la unuan Dimanĉon de la monato)
Lundo	11.30–11.40	PRG2 (Brazilo). 104m. P.
	17.30–17.40	Wien II. 31m., 41m. kaj 228.6m. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV.
	20.50–21.00	Praha. 470.2m. Prelegoj, intervjuoj, teatraj scenetoj, kantoj kaj informoj. Radiostacio, Stalinova 12, Praha XII.
	21.00–21.30	Ĉeĥoslovakujo. 269m. kaj 325m. Verda Stacio. Arto-programo. (Nur la unuan Lundon de la monato).
	23.30–23.35	Budapest I. 549.5m. I. Hungara Radio, Budapest VIII, Bródy Sándor u. 7.
Mardo	18.05–18.10	Bern. 25.61m. kaj 48.66m. P. de D-ro Baur. Schweizer Kurzwellendienst, Neungasse 28, Bern.
	18.50–19.00	Sofia. 32.09m. P. Radio Sofia.
	20.45–21.00	Hradec Králové. 238m. (Krom la unua mardo).
	21.00–21.10	Ostrava. 259m. Radiostacio, Ostrava, Bráfova 5 (krom la unua mardo de la monato).
Merkredo	10.15–10.35	Paris. 431.7m. K.
	21.10–21.25	Warszawa III. 48.25m. I. Pola Radio, Warszawa, Koszykowa 8.
	23.30–23.35	Budapest I (kiel je lundo).
Ĵaŭdo	17.45–18.00	Hradec Králové. 280m. Vychod-očky vysilač, Hradec Králové, Ĉeĥoslovakujo.
	18.05–18.10	Bern. 25.61m. kaj 48.66m. P. de D-ro Privat.
	20.50–21.00	Praha. 470.2m. (kiel je lundo).
	21.00–21.10	Ostrava. 259m.
Vendredo	17.15–17.30	Hilversum I. 301m. P. (nur je 27a Aŭg.)
	18.50–19.00	Sofia. 32.09m. P. Radio Sofia.
	23.30–23.35	Budapest I (kiel je lundo).
Sabato	13.00–?	München. 405m. kaj 48.70m., kaj Nürnberg 315.8m. K. (ĉiun duan sabaton). Radio München, Kulturabteilung, Rundfunkplatz 1, München Bayern, Germanujo.

Klarigoj—En la tabelo la horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon. Ni petas informon pri necesaj aliigoj. La donitaj adresoj estas tiuj al kiuj oni sendu gratulleterojn kaj informojn pri ricevo.

NIA PROPAGANDO

Tezo por la 2-a Laborkunsido en Malmö

Unu el la laborkunsidoj de la Kongreso en Malmö pritraktos la enhavon kaj metodojn de nia propagando. Ĉi tiu demando estas sendube unu el la plej gravaj kaj samtempe la plej delikata problemoj de nia tuta agado. Se bona kaj trafa propagando signifas vivigon kaj antaŭenpuŝon de la afero, tiurilata fuŝado povas detrui multjaran seriozan laboron. Sekve, la propagando estas laŭ sia efiko ne nur pli aŭ malpli bona, sed ofte rekte malbona kaj malutila.

La laborkunsido dediĉita al tiu afero havos la taskon trovi—surbaze de la ĝisnunaj spertoj—la elementojn, kiuj, en la nunaj mondaj cirkonstancoj, kaj je konsidero de la apartaj sociaj medioj, estas aplikeblaj en la propaganda laboro.

Por ebligi fruktodonan, koncizan diskuton kaj seriozan, efektivegeblajn decidojn, ne petas ĉiujn diskutontojn plej atente sin prepari. Jen la ĉefaj priparolotaj punktoj:

(1) Tri branĉoj de la poresperanta agado: Propagando—instruado—praktika aplikado; ilia kunligiteco kaj reciproka influo.

(2) Ĉefaj propagandaj eraroj: Nesufiĉa kono de Esperanto; ignoro de fundamentaj leĝoj pri la ekesto kaj evoluo de la lingvo ĝenerale; ideologia sektismo kaj mistikismo; manko de gvidaj propagandaj centroj.

(3) Nepraj kvalitoj de propagandisto: Inteligento, klero, oratorkapablo, kono de Esperanto kaj de la problemoj pri la internacia lingvo.

(4) Enhavo de la propagando:

(a) El lingva vidpunkto: La lingvo kiel socia fenomeno; ekesto de la lingvoj; multlingveco en pasinteco; evolutendenco kondukanta al unueca lingvo en la estonteco; principa identeco inter la naciaj literaturaj lingvoj kaj Esperanto; Esperanto estas tiom *arta* kiom la literaturaj naciaj lingvoj; Esperanto naskiĝis, kreskis kaj vivas laŭ la samaj leĝoj regantaj kiun ajn alian lingvon; perfekteco de Esperanto (ekzemploj); ĝia relativa facileco (ekzemploj) belsoneco (ekzemploj).

(b) El ideologia vidpunkto: Funkcia rilato inter socio kaj socia fenomeno; la radikoj de la sociaj fenomenoj troviĝas en la materia vivo de la socio, sed foje ekĝermintaj kaj elkreskintaj ili iamaniere materiĝas kaj siavice influas la pluan evoluon de la socio; la unuecaj naciaj lingvoj estas rezulto de unuecigaj tendencoj surbaze de kreskintaj ekonomiaj fortoj trapasantaj la kadrojn de la ĝistiamaj teritoria

disrompiteco—transiro de feŭdismo al kapitalismo; tamen, foje realigitaj, ili mem helpis ĉi tiujn unuecigajn tendencojn kaj fariĝis unu el la esencaj elementoj de nacieco; la Internacia Lingvo ekestis kiel logika konsekvenco de pligrandiĝinta reciproke ekonomia dependeco inter la diversaj mondpartoj, ebligita per la samtempa amasigo kaj perfektigo de teknikaj komunikiloj, kio kreis en la spiritoj novajn proksimigajn tendencojn en tutmondaj kadroj; tamen, foje realigita, Esperanto siavice influas subtene ĉi tiujn tuthomarajn proksimigajn tendencojn.

(c) Adapto de la enhavo al medio: Surbaze de la punktoj (a) kaj (b) adapti la propagandon al intelekta kaj klereca nivelo de la medio en kiu oni propagandas; plilarĝigo de la argumentoj (literaturo, gazetoj, korespondado, radio, vojaĝo k.t.p.) laŭ la profesio aŭ okupo de la medio (laboristoj, studentoj, komercistoj k.t.p.).

(5) Metodoj: artikoloj kaj notoj en revuoj kaj gazetoj; publikaj prelegoj (universitatoj, lernejoj, sindikatoj, klerigaj societoj, kulturdomoj, radio k.t.p.); ekspozicioj; *vojaĝantaj* ekspozicioj; filmoj; statistikoj; flugfolioj; kolektiva korespondado inter neesperantistaj institucioj pere de Esperanto; aliaj metodoj.

(6) Esperanto - semajnoj: Serioza preparo; samtempeco en kiom eble da landoj; intenseco; mobilizo de ĉiuj propagandaj fortoj; eluzo de ĉiuj rimedoj; grandskala atako al amasoj, precipe al la laborista kaj studenta junularo; malfermo de novaj kursoj tuj post la semajno.

(7) Organizaj demandoj: Kreo de propaganda fako de U.E.A.; sekretarioj por propagando en ĉiu landa asocio kaj en ĉiu societo; propagandaj *perantoj* en lokoj kie ne ekzistas societoj; aparta paĝo en *Esperanto* kun informoj kaj direktoj pri propagando; kunligo de ĉiuj propagandaj centroj.

* * *

La ĉi-supraj tezoj estas nur vojmontrilo por la diskuto. En Malmö estos necese plilarĝigi, pliprofundigi kaj eventuale eĉ ŝanĝi ilin. Estu kiel ajn, ŝajnas al mi, ke ĉiu Esperantisto, kiu sincere amas nian aferon, devas plej serioze pripensi la problemon de nia propagando. Anstataŭ serĉi la kaŭzojn de la nesufiĉe rapida disvastiĝo de Esperanto en la konstruo de la lingvo mem; anstataŭ perdi tempon kaj monon altrudi iujn *reformojn*, kiujn neniu serioza Esperantisto iam akceptos, prefere ni fine konsciu, ke grandparte ni Esperantistoj mem kulpas, se la afero de Internacia Lingvo ne marŝas pli rapide. Ni faru bonan propagandon, ni evitu la kelkfoje kaj kelkloke teruran fuŝadon, kaj la pozitivaj rezultoj certe ne mankos.

D-ro Ivo Lapenna

ESPERANTO KAJ PARTIOJ KAJ SINDIKATOJ

Referato en la laborkunsido de la Germana Esperanto-Kongreso, München, Pentekosto 1948

La mondo jam ne estas tiom vasta kiom antaŭ jarcentoj ĉar per la modernaj trafikiloj la homoj, eĉ la diversaj nacioj, pli multe najbariĝis.

Laŭ ekonomia kaj politika vidpunktoj ni povas konstati ĉiam pligrandiĝantan reciprokan dependon de unuopaj ŝtatoj, unu de la alia. Ni Esperantistoj estas konvonkitaj, ke ni kiel unuan paŝon baldaŭ vidos la kunfandiĝon de la ŝtatoj Eŭropaj, se tiu kontinento ne devas fariĝi senpotenca kolonio aŭ de la oriento aŭ de la okcidento. La estontaj *Unuigitaj Ŝtatoj de Eŭropo* ne povos senatente preteriri la ĝeneralan kaj taŭgan solvon de la lingva problemo. Ĉi tiu solvo certe ne estos unu el la 120 diversaj lingvoj parolataj en Eŭropo, sed kompreneble nur neŭtrala facile lernebla helplingvo, nome nia praktika jam tiel bone elprovita Esperanto.

La vojo al la oficiala enkonduko de Esperanto gvidas trans la parlamentojn de la unuopaj ŝtatoj. Tie la parlamentanoj reprezentas, kiel elektitoj de la politikaj partioj, la volon de la popoloj.

Ĉi tiu supre nomita celo, la oficiala rekono de Esperanto, bazas sur la kuntrafado, la renkontiĝo, de du komponentoj nome: la plej vasta favorado pere de la grandaj popolamasoj, kaj due, la varbado de la plej altrangaj gvidantoj. La favoron de la parlamentanoj kaj aliaj gvidantoj ni atingos nur per la politikaj partioj. Helpo por tio estas la kolektado de petskriboj al UNO kiun organizas Universala Esperanto-Asocio. Jen pri tio interesa afero.

Antaŭ unu jaro ĉe ĉi tiu kolektado Germanujo staris en la vico de koncernaj nacioj je 20-a loko. Hodiaŭ ni atingis fiere la pinton, la unuan lokon en ĉi tiu paca konkurso, kaj gazetoj skribas pri la *germana miraklo*!

La sekreton mi povas klarigi. Ĝi estas tute natura kaj malkomplika. Necesas unue persona kontakto kun gvidantaj personoj de la koncernaj organizaĵoj. Tiamaniere ni gajnis per la unua atako la 127,000 da kolektivaj subskriboj de la Bavara Sindikato, loka komitato München. Sekvis la Sindikata Ligo por tuta Bavarujo kun pli ol 700.000 da membroj! Kaj nun progresas senhalte la tuta afero.

En Germanujo ni havas pli ol 8.000.000 da organizitaj sindikatanoj kaj nia plej proksima celo estas tute klara, ĝi estas nun komprenebla afero. Al vi, germanaj samideanoj, mi vokas: subtenu nin per ĉiuj fortoj!

Memkompreneble, la nura kolektado de subskriboj neniam povas esti nia sola celo rilate la sindikatojn. Ni devas varbe penetri, aktivigi ilin, ĉar internacia lingvo harmonias kun la ideologio de la sindikatoj. Ili mem havos la plej grandan profiton el la praktika aplikado de Esperanto dum internaciaj kongresoj kaj kunvenoj kaj ĉe skribaj interrilatoj kun samcelaj organizaĵoj alilingvaj.

La sindikatoj povas ĉe ni plej efike influi la instruplanojn de la popolaj altlernejoj. Laŭ interkonsento kun la Bavara Sindikato, de nun Esperanto aperos en la instruplano de ĉiu popola altlernejo en Bavarujo. Ni devas nur disponigi al ili kapablajn instruistojn. La novan favorigon de Esperanto ĉe Radio München ni parte ŝuldas al la fervoraj postuloj de la sindikatoj al la stacio. La venonta numero de *Gerwerkschaftszeitung*—eldono por la junularo—presigos la unuan artikolon poresperantan. Aliaj gravaj subtenoj flanke de la sindikatoj estas en preparo.

Nun kelkajn vortojn ankoraŭ pri niaj rilatoj kun la politikaj partioj. Ni direktis personan leteron al ĉiu parlamentano, kun la peto sciigi al ni la sintenon al Esperanto. La ankoraŭ ne finita esploro havas ĝis nun jenan rezulton:

Respondis el la 100 parlamentanoj de	CSU, 38 aŭ 38%
„ „ „ 53	„ „ SFD, 31 „ 58%
„ „ „ 12	„ „ WAV, 7 „ 58%
„ „ „ 9	„ „ FDP, 3 „ 33%

(CSU=Kristana Sociala Unio; SPD=Socialdemokrata Partio; WAV=Ekonomia Partio; FDP=Liberdemokrata Partio)

El ĉiuj parlamentanoj respondis 45%, el la ricevitaĵoj respondoj 96% estas favoraj por Esperanto, kaj nur 4% malfavoraj aŭ senkritikaj. Ĉi tio kuraĝigas nin esperi pliajn sukcesojn. La socialdemokrata partio dum sia tutgermana partia kongreso 1947 en Nürnberg akceptis rezolucion: „... favorigi kaj subteni la enkondukon de Esperanto inter la laboristaro kaj pli intensigi la praktikan aplikon por internacia korespondado kun la eksterlandaj laboristaj organizaĵoj, kaj la uzon ĉe internaciaj kongresoj laboristaj kaj sindikataj.”

Ni havas la certan konvinkon, ke ni laŭ la montrita maniero certe alpaŝis la ĝustan vojon gvidantan al la oficialigo de nia lingvo tiel en nia lando, kiel ankaŭ en aliaj. Kaj la bona sukceso estu la bela rekompenco pro la farita laboro.

Dipl.-Ing. Rudolf Jochmann

TRA LA MONDO ESPERANTISTA

Belgujo

La Belga Ligo Esperantista, fondita en 1905, de tiu epoko ĉiujare dum la Pentekostaj tagoj festas la Zamenhofan lingvon.

La 15-an, 16-an kaj 17-an de Majo kunsidis en Charleroi por la 32-a ĉiujara festo, la Esperantistoj disĉiploj de la poeto Antoine Clesse, kiu kantis: *Flandra, Valona, estas antaŭnomoj; Belga estas nia familia nomo.* La urbo Charleroi, fondita de la reĝo Karlo II-a de Hispanujo, nun estas grava intelekta kaj industria centro. La kongreson organizis lokaj samideanoj gviditaj de S-roj Juste kaj Paŭlus, kiuj ĵus restarigis la grupon. En la lukse belega moderna urbdomo la kongresanoj estis tre afable akceptataj de S-ro Skabeno Escarmure, anstataŭanto de la urbestro, kiu estis malsana.

La kongreson agrabligis tre belaj arta kaj muzika partoj danke al la agemo de Charleroi-anoj kaj Bruselaj samideanoj. La direktantoj de *Usines Métallurgiques du Hainaut* akceptis la kongresantojn por instrua vizito al la gravaj ferfabrikejoj de tiu entrepreno. Ekskurso al Loverval estis bela fino de fruktodona kaj agrabla festo.

C.V.

La XIII-a Kongreso de Flandra Ligo Esperantista okazis kun scenoj de granda entuziasmo kaj multa fervoro en Blankenberge dum la Pentekostaj tagoj. Organizite de la loka grupo sub prezido de D-ro Couwenberg, la festo estis inspira manifesto, precipe pro la granda nombro de junaj samideanoj, kio bonaŭguras por la estonteco.

Ĉi tiu estis la unua kongreso post la akceptiĝo de la Ligo kiel filia landasocio en U.E.A. kaj la partoprenantoj aklame salutis la oficialan anoncon pri tio.

La Kongreso havis internacian karakteron pro ĉeesto de pluraj eksterlandanoj. Gastoj de la Kongreso estis Ges-roj Mason Stuttard el Anglujo, kaj samideanoj el Nederlando partoprenis. S-ro Stuttard prelegis pri *La funkcio de U.E.A.* kaj donis intiman bildon pri la internaj aranĝoj kaj problemoj de la Asocio.

La Urbestro oficiale akceptis la Kongreson.

Por la distro de la partoprenantoj la loka Kongresa Komitato organizis balon, varietean vesperon kun artmuzikaj eroj, kaj ekskurson al Knocke. Ke la dolĉaj voĉoj de la gejunuloj sonu ankoraŭ en Esperanto tra la jaroj!

Eksterordinare gaja kaj brila festo.

M.S.

Britujo

Proksimume 250 gesamideanoj ĉeestis la 33-an Britan Kongreson en Southport, kiam la urbestro oficiale bonvenigis la delegitojn. Malgraŭ la aliaj allogaĵoj en bela marbordurbo, kaj brila vetero, la kunvenoj estis bone ĉeestataj kaj oni aŭdis multajn raportojn pri faka kaj ĝenerala laboro. Evidentiĝis, ke la membroj deziras vidi pli da aktiveco en la laboro, kaj B.E.A. nun konsideras detalojn de nova trijara plano por plivigli kaj plifortigi la movadon en Britujo.

La tre bela kongresbalo estis donaco de la Urbestro kaj en ĝi oni prezentis agrablan kaj unuarangan kabaredon.

La venontjara kongreso verŝajne okazos en Hoddesden, proksime de Londono.

Ĉeĥoslovakujo

Responde al peto pri la enkonduko de Esperanto en la temaron de la lernejoj, la koncerna ministerio dekretis, ke pro la jam troŝargita stato de la temaro oni ne povas tion fari, sed ke oni rajtas fondi studgrupojn ekster la normalaj studhoroj. Oni instrukas la iniciatantojn sin turni al la direktoj de la lernejoj. Tio efektive estas granda paŝo antaŭen. En Ivančice kaj Liberec oni jam gvidas lerneajn kursojn nedevigajn.

Danujo

Dana Esperantista Komun-Komitato presigis grandan dukoloran afiŝon (60 × 90) kun teksto ((kun granda verda stelo kun vorto *Esperanto*):

ESPERANTISTO !

por

informado, servo kaj helpo
turnu vin al loka reprezento de

.....
(Danlingve : Esperanto estas plej rekta vojo
al internacia kompreno kaj kunlaborado)

Oni jam agis simile en Nederlando, Hungarujo kaj Germanujo por utili al vojaĝantaj samideanoj kaj . . . al Esperanto.

La afiŝon pendigas lokaj reprezentantoj de U.E.A., S.A.T., C.D.E.L. kaj D.L.E.A. en kiom eble da publikaj trafiklokoj.

P.Th.

La Muzeo de H. C. Andersen, la dana fabel-poeto, Odense, petis ĉe Dana Esperantista Komun - Komitato kiom eble da verkoj de Andersen en Esperanto, por la kolektoj. Proponojn sendu al Libro-Servo, Jørgensgade 4 A, Kopenhago N, Danujo

Francujo

La Esperanto-Kongreso de la franca regiono Normandujo estis tre sukcesa. Partoprenis 300 kongresanoj kaj la belaj ekspozicioj altiris multajn vizitantojn. La oficialaj urbadministrantoj solene akceptis la samideanojn, kiujn prezentis S-ro Bosc, kongres-prezidanto. Interalie, la partoprenantoj vizitis faman likvorfabrikejon *Benediktine*.

En la samtempe okazanta Marista Kongreso la partoprenantoj decidis restarigi la *Internacia Ligo Marista*.

A. Legros, Fecamp

La 4-a Nacia Kongreso de U.E.F. okazis en Parizo je Pentekosto. S-ro Richard Levin, prezidanto de *Esperanto kaj Komerco* estis elektata prezidanto de la matena kunveno kaj li malfermis la kongreson.

Post legado de salutoj, S-ro Guillaume faris detalan raporton pri la agado en Francujo kaj ekzamenis la rimedojn por plifortigi la organizaĵon.

S-ro Waringhien raportis pri la klopodoj, starigi superan organizaĵon interkonsente kun S.A.T. kaj anoncis la sukcesan kulminon de la intertraktoj en *Franca Esperanto-Institucio*, kiu estos komuna lingvo-institucio.

S-ro Guillaume, kiel Ĉefdelegito, raportis pri U.E.A. kaj emfazis la neceson por pli da individuaj membroj en Francujo.

En la elekto de oficistoj, S-ro Warnier fariĝis prezidanto por la venonta periodo kaj oni varme aklamis lian enofiĉigon.

Dum la posttagmeza kunsido oni multe akcentis la gravon de senĉesa kaj vigla propagando. Generalo Bastien komunikis decidon de S-ro Petit aksiĝi kaj post propono de S-ro Waringhien oni esprimis dankon al S-ro Petit pro lia multa kaj altvalora laboro por Esperanto.

Nederlando

La urbestro de Rotterdam decidis renomi parton de strato ĝis nun nomita *Plantageweg*. La nova nomo estas *Zamenhofstraat*. La Roterdamaj samideanoj inaŭguris la novan nomtabulon la 29-an de Majo per mallonga solenaĵo dum kiu parolis, inter aliaj, amikoj el Usono, Hispanujo kaj Rumanujo. La saman vesperon radiostacio Hilversum disaŭdigis la solenaĵon. Tiu estas la unua *Zamenhofstraat* en Nederlando.

Germanujo

Inter la 850 membroj de la Germana Katolika Esperanto-sekcio troviĝas: 6 monsinjoroj, 3 vikarioj, 47 katolikaj pastroj, 7 protestantaj pastroj, 32 kuracistoj kaj 27 advokatoj.

La konsilantaro de Hannover disponigis 3.500 germanajn markojn al la junulara sekcio de la Esperanto-Unuiĝo por ebligi al junaj Esperantistoj la partoprenon en la Internacia Junularkunveno en la Alpoj je Pentekosto.

Justec- kaj Kultur-ministro de Rheinland-Pfalz, S-ro D-ro Süsterhenn donis sian subskribon al la kampanjo por Esperanto en UN.

Hungarujo

La Hungara Landa Kongreso en Győr dum Pentekosto estis brila sukceso kun 500 partoprenantoj. Pro ne sufiĉe frua peto pri enirpermeso nemultaj eksterlandanoj povis ĉeesti, tamen inter ili estis pluraj bulgaraj, po unu ĉeĥa kaj unu sveda samideanoj. Sekve de bona organizo la tri vagonoj da samideanoj el la ĉefurbo atingis stacidomon en Győr per flagoj ornamitan, kun orkestro de la polico, kiu ludis la nacian kaj Esperantan himnojn. Krome ilin salutis skolta trupo kun trumpetsono. Post oficiala akcepto de reprezentanto de la urbo, respondis ŝtatssekretario Fr. Vasadi-Kovács, prezidanto de H.E.S.

La kunsidoj okazis en la bele ornamita urbdomo en kiu funkciis ankaŭ Esperanta poŝtejo kaj vendejo de *Literatura Mondo*. Menciinda estas partopreno de 78 ĉefurbaj tramistoj kun propra orkestro kaj 50 fervojistoj el diversaj partoj. Ĉiuj gravaj instancoj sendis aŭ reprezentanton aŭ saluttelegramon.

Al la plej granda grupo de vizitantoj la loka grupo prezentis bronzan statueton kreitan de samideano artisto en Győr.

La kongreso decidis starigi konkurson de varbado kiun partoprenu grupoj kaj opaj personoj. La kongreso krome registris sian malakcepton de la propono pri reformita Esperanta alfabeto, kaj deklaris ke la supersignaj literoj neniam estis malhelpo al la progreso de Esperanto en Hungarujo.

H.E.S. aranĝas en Budapeŝto en la unua dimanĉo de ĉiu monato Literaturan kaj Artan Prezentadon. Tio okazas en la granda salono de la Muzikakademio kaj ĉiam ĉeestas grandnombra publiko.

Kanariaj Insuloj


Aldone al la informoj jam aperintaj en la organo de U.E.A. ni ĝojas raporti, ke elvolviĝis en la Universitato de La Laguna nova kurso de Esperanto, kiun partoprenis dudek studentoj kaj profesoroj. La kurso estis nedeviga sed tamen

oficiala kaj havis la financon subtenon de la aŭtoritato. La sinteno de la aŭtoritatoj nun regantaj en la regiono ne permesas laŭlegan starigon de grupo aŭ societo.

En Santa Cruz de Tenerife S-anino E. Wolff, Delegito de U.E.A. gvidas kurseton inter siaj gelernantoj. En Las Palmas, ĉefurbo de la insulo Gran Canaria, troviĝas kelkaj entuziasmaj samideanoj, kaj en Mazo, insulo Las Palmas, ĵus ekvekiĝis intereso por nia afero.

La neeblo sendi monon el Hispanujo por aĉeti librojn, aboni gazetojn kaj aliĝi al Esperantistaj organizaĵoj iom malhelpas la praktikan agadon. Malgraŭ ke oni ankoraŭ ne povis publike agitati por la internacia lingvo, la semo de Esperanto firme enradikiĝis sur la arkipelago, kaj ĉio esperigas helan estontecon por nia afero.

J.R.P.



Dua oficiala Esperanto-kurso en la Universitato de La Laguna. Side, de dekstre: la dua S-ro J. Maynar Duplá, Dekano de Kemia Fakultato; 3-a, S-ro J. Régulo Pérez, kursgvidanto.

Esperanto kaj la lernejo

Dum la U.K. en Malmö la geinstruistoj kunvenos por diskuti la gravan demandon: kiel plej bone agi por akceptigi Esperanton en la lernejo. Kiel bazon, necesas havi informojn pri ĝis nun atingitaj rezultoj. Tial *Internacia Instruista Kunlaborado* petas geinstruistojn kaj aliajn, sciigi al ĝi ĉion kio povos servi al tiu celo. Sendu simplan raporton, kiel statas en via loko aŭ en via lando. Temas pri tio, kie Esperanto estas instruata, ĉu la instruado estas deviga aŭ libervola, kiom da gelernantoj studas Esperanton, ĉu la komunumo aŭ ŝtato subvencias, kaj se jes, per kiomaj sumoj k.s. Vi certe komprenas nian deziron. Skribu al Centra Oficejo de IIK, Einar Dahl, Uddevalla, Svedujo.

Norvegujo

Dum Pentekosto la jarkunveno de Norvega Esperantista Ligo okazis en Oslo. La 15-an de Majo okazis ĝenerala kunveno de la Eldonejo Esperanto A/S kaj poste Interkonatiĝa Vespero, kun prezento de teatraĵeto kaj diversaj amuzaĵoj.

La diversaj raportoj montris, ke N.E.L. troviĝas en bona stato, malgraŭ ke nur malmultaj kursoj okazis. Oni informis, ke la Norvega Asocio de Popollernejaj Instruistoj en kunlaboro kun N.E.L. ĵus eldonis elementan perkorespondan kurson de Esperanto, per kiu oni esperas superi la mankon de instruistoj.

S-ro J. Matland faris prelegeton pri ĝeneralaj principoj de propagando. La elekto de oficistoj difinis, inter aliaj, C. Støp-Bowitz, Prezidanto kaj O. Rygg, ĝenerala sekretario. Kiel Ĉefdelegito de U.E.A. daŭre funkcias R. Rian.

La 17-a de Majo estas la nacia tago de Norvegujo kaj la aranĝintoj havigis al eksterurbaj vizitantoj lokojn tuj antaŭ la reĝa palaco por rigardi la tradician ceremonion de la infanprocesioj.

Adiaŭa lunĉo okazis en la nova Esperanto-kafejo en Oslo.

ESPERANTISTA VIVO

* Naskiĝoj

Bertin. Al Ge-sroj André Bertin, Parizo, je la 3a de Junio 1948, filineto, Liliane.

Konstantinova. Al Ge-sroj Konstantinova, en Sofia, Bulgarujo, je la 14a de Marto 1948, filino nomita Esperantina.

Sharpe. Al Ge-sroj Sharpe, Del. de UEA en Chapel Hill, N.C., Usono, je la 30a de Aprilo 1948, filo nomita Lawrence A. Sharpe, jr.

Edziĝo

Thorsen-Nielsen. Je la 30a de Aprilo 1948 Poul Thorsen kun F-ino Roma Nielsen, Kopenhago. Koran deziron je daŭra feliĉo!

ESPERANTA LEGOLIBRO

VILHO SETÄLÄ

Bindita 112 paĝoj

Prezo 2 ŝil. 6p., aŭfranko 4p. (11 rpk.)

Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth, Anglujo



Parlamento subvencias la Kongreson :

La sveda parlamento unuanime akceptis la proponon de la registaro asigni 10.000 kronojn al la L.K.K. de la U.K. en Malmö por la preparoj de la kongreso. Tiu decido montras la ĝeneralan komprenon de la svedaj oficialaj instancoj rilate al Esperanto.

La sveda ĉefministro, S-ro Tage Erlander, prenis sur sin la protektantecon super la kongreso.

La urbo Malmö regalos la kongresanojn per tesupeo kaj senpaga tram- kaj aŭtobus-veturado dum la kongreso. La urbo estos ornamita per la samaj flagoj, kiel dum la Skania Foiro.

Aliĝoj : ĝis la 4a de Junio aliĝis 1400 el 31 landoj.

Somera Universitato : La rektoro de la universitato estos rektoro Karl Söderberg, Uppsala.

Prof. Björn Collinder de la universitato de Uppsala prelegos pri la laponoj en Svedujo.

S-ro R. Rosetti el Wrexham, Kimrujo, parolos pri la Kimraj artfestivaloj, modelo por Esperantaj tutmondaj kulturludoj.

S-ro Stöp-Bowitz el Oslo, Norvegujo, prelegos pri la temo *El la mirinda naturo*.

S-ro Vilho Setälä, Helsinki, Finnujo, prelegos pri *La kalevala kulturo*.

Prof. Knut Lundmark, universitato de Lund, prelegos pri *Astronomiaj sensacioj*.

D-ro Ivo Lapenna, universitato Zagreb, Jugoslavujo, elektis la temon *Ĉefprincipoj en la nuntempa internacia juro*.

Rektoro S. A. Stahre el Stockholm, prelegos pri la koopera movado en Svedujo kaj pri ties klerigaj taskoj.

D-ro Paul Neergaard el Kopenhago, Danujo, prelegos pri *El la fronto kontraŭ la malamikoj de la kulturplantoj*.

D-ro F. Szilágyi el Budapeŝto, Hungarujo : *Du svedoj kaj unu hungaro, Albert Engström, Hasse Z, kaj Karinthy*.

Radio : la L.K.K. informas ke ĝi sendos informojn kaj raportojn pri la kongreso ĉiutage 31 Julio–7 Aŭgusto inter 16.00–16.15 MET. (Greenwich 15.00–15.15) per mallongaj ondoj 19.80m. aŭ 27.83m.

Interesa poŝta stampo : la kongreso havos specialan stampilon. Gesamideanoj, kiuj volas havi sendaĵon kun tiu stampilo, povos sendi al la 33-a 1 respondkuponon kaj koverton aŭ karton kun la adreso jam skribita.

Skania Foiro : ĉiuj kongresanoj povos viziti la Skanian Foiroon dimanĉe la 1-an de Aŭgusto por duonprezo.

Postkongreso en Kopenhago

Postkongreso kun interesa kaj alloga programo okazos en Kopenhago. Por ricevi detalojn kaj ĉiujn informojn, oni turnu sin al : Postkongresa Komitato, Pr. Jørgensgade 4 A, Kopenhago, Danujo.

Grupaj kaj lokaj anoncoj

La redakcio kaj Centra Oficejo ofte ricevas petojn anonci aferojn—grupajn kaj kursajn aranĝojn, aludojn pri vigla laboro flanke de iu persono k.s.—kiujn ĝi efektive ne povas, ĉar tiuj detaloj ne apartenas al la sfero de internacia agado. Ni alte taksas la laboron, kiun faras niaj membroj en diversaj lokoj, sed atentigas, ke centoj da samideanoj simile agas en diversaj partoj de la mondo. La rekompenco estas en la laboro mem por alta kaj nobla idealo, ne en mencio en la gazeto, kaj ni petas niajn samideanojn ne depreni de la vera valoro de eksterordinaraj mencioj, per insisto pri aludo pri la propra faro.

* * *

Sekve de la 250 kartoj kaj leteroj, kiujn la klubo en Vejle, Danujo, ricevis el 21 landoj, oni dissendis al ĉiuj belan, presitan, dukoloran, ilustritan leteron.

* * *

Aldone al la informoj, kiujn ni donis pri la Kongreso en Torino, ni ricevis sciigon, ke kongresanoj voĵagantaj inter la landlimo kaj tiu urbo, ricevos rabaton je 30% ĉe la fervojoj, kaj 10% rabaton en hoteloj kaj restoracioj. Eksterlandanoj povos antaŭ-aliĝi kaj pagi en la momento de alveno en Torino.


S-ino D-ino C. Conterno

“ESPERANTO”

Legantoj bonvolu noti, ke la nuna numero portas la daton *Julio-Aŭgusto* kaj ke la venonta numero do estos tiu de Septembro, kiu enhavos raporton pri la Kongreso en Malmö.

TRA LA LIBRARO

* = akireblaj ĉe U.E.A.



***La Forto de l'Vero :** de Adi. Eld. Dansk Esperanto Forlag. 21.5 × 14cm. 62p. broŝ. prezo 3ŝ. 6p.

Dua eldono de simplastila, iomete naiva romaneto originale verkita en Esperanto. La eldonistoj saĝe kontroligis la tekston de la unua eldono, kaj la signo de la Literatura Komitato de F.L.E. garantias la lingvonivelon. Tre taŭga en la nuna formo por kursfinintoj.

Urbo São Paulo : treege interesa 44-paĝa broŝuro ilustrita, eldonita de la Instituto Brazila de Geografio kaj Statistiko por signi la okazigon, en la ĉefurbo de la Ŝtato São Paulo, de la XI-a Brazila Kongreso de Esperanto. Ĉi tiu verko, kiu sekvas la unuan *Urbo Salvador* estas la dua en la serio, kiu celas diskonigi al la mondo la aspektojn de la ĉefurboj de Brazilo.

Borneo laŭ bildoj : La Vizaĝo de la Terglobo : du novaj tekstkajeroj en la serio eldonita de la Esperanto Film - Grupo en Bergen - Op - Zoom, Nederlando. Ĉi tiuj filmstrioj estas treege interesaj kaj havas definitivan edukan valoron. Grupoj povus pasigi agrablan vesperon per prezento de ĉi tiuj lumbildoj kun lerta leganto de la tekstoj.

Poŝtkarto kun bildo pri la Paco kaj poŝtstampo de la ĵus okazinta 18-a Hungarlanda Kongreso de Esperanto en Győr. Prezo kun afranko : 3 int. rpk. Ricevebla ĉe Esp. Kultur-Servo, Budapeŝt III, Jolsva u.4. Hungarujo.

La Urbeŝtraro de Hradec Králové eldonis Urboplanon de la urbo kun klarigoj en Esperanto krom aliaj lingvoj. En aldonita broŝuro troviĝas konciza artikolo en Esperanto pri la historio kaj evoluo de la urbo.

Internacia Komerca Foiro-Ostendo : Afliŝo de la Ostenda Grupo Esperantista (Sekcio de Fl.L.E.) pri la tiu-urba foiro.

Esperanto - Glumarkoj : (a) Kun verdkolora desegnaĵo de D-ro Zamenhof; (b) kun vidaĵo al Sfinkso kaj Piramidoj; prezo 100 div. 3 rpk. ĉe T. Megalli, P.B.1914, CAIRO, Egiptujo.

Roterdama Urbokoro : Ni salutas la duan eldonon de ĉi tiu informa kajero pri la rekonstruo de Rotterdam. La Eldonintoj atentigas, ke ĉi tiun duan eldonon oni sendos nur al fakanoj, sed ne al la ĝenerala petanto. Adreso : Coolsingel 107, ROTTERDAM, Nederlando.

Esperanto-Türkce ve Türkce-Esperanto Lugati : de Prof. H. Aydinoglu. Esperanta-Turka Turka-Esperanta Vortaro. Broŝ. 32p., prezo nemontrita.

La Miranda Nilolando : tekstoj de la bildoj en Filmstrio 326/11 de la Esperanto Film-Grupo en Bergen-Op-Zoom. 27-paĝa kajero, multobligita, kun tekstoj pri 66 bildoj. Lingvo bona. Turismaĵo.

ISLANDO

Kompare nemultaj homoj konscias la gravegan strategian situon de Islando. Dum la ĵusa milito, oni tamen rekonis tiun fakton kaj tie sidis dum pluraj jaroj tuta armeo. Kiam oni rigardas al la estonteco oni konscias, ke Islando okupas unikan lokon, ĉu vide al eventuala mondkonflikto, ĉu vide nur al la transmonda aertrafiko, ĉar la lando estas oportuna *desaltejo* kaj haltloko sur la transarktaj fluglinioj. La afero de lingvo internacia do estas grava en tiu jam ne fora lando kaj la Islandaj samideanoj konscias la gravegan kontribuon, kiun ili povus fari por Esperanto. Oni jam scias pri la grandega kontribuo al la Petskriba Kampanjo kaj oni ne miros pro la informo, ke en Islando oni provas fari tiun landon la unua Esperanton-apoganta ŝtato. Diversmaniere oni *atakas* la oficialajn instancojn kaj la Landa Asocio *Aŭroro* lastatempe faris tutlandan informpeton al ĉiuj lernejoj pri tio, ĉu ili deziras ke oni instruu Esperanton en la lernejo. La finaj ciferoj estas: por 1170 aŭ 72.5%; kontraŭ 275 aŭ 17.1% kaj neŭtralaj 168 aŭ 10.4%. Do tre favora por nia agado. Oni turnas sin konstante al la instruaŭtoritato, al la direkcio de la poŝto kaj telefonoj kaj al la radio kun petoj uzi oficiale la internacian lingvon, kaj oni tre volus havi la moralan subtenon de eksterlandaj samideanoj en tiu afero. Skribado al la nomitaj instancoj eble multe helpus, kaj niaj Islandaj samideanoj tre petas, ke eksterlandaj legantoj multnombre direktu petojn pri uzo de Esperanto.

En la nuna tempo D-ro Mildwurf, konata ĵurnalisto, faras prelegojn kaj gvidas kursojn en Islando. Kvankam la tempo ne estas tre favora (printempo-somero) tamen la kursoj estas sukcesaj kaj oni atendas bonajn rezultojn.

En Islando regas la forta konvinko, ke se oni povos varbi la oficialajn instancojn por Esperanto, aliaj najbaraj landoj sekvos. Jen kial gravas la laboro en tiu malgranda lando.

(el diversaj fontoj)

LA PETSKRIBO

Landoj

Germanujo ..	2,094,592	Hungarujo ..	6,160
Ĉeĥoslovakujo ..	1,032,194	Portugalujo ..	3,462
Norvegujo ..	489,869	Aŭstralio ..	3,370
Brazilo ..	169,446	Nov-Zelando ..	2,540
Francujo ..	62,090	Svisujo ..	2,250
Nederlando ..	52,670	Egiptujo ..	1,832
Islando ..	28,348	Grekujo ..	1,512
Britujo ..	27,839	Maroko ..	1,278
Belgujo ..	26,819	Palestino ..	528
Bulgarujo ..	21,991	Irlando ..	463
Svedujo ..	18,373	Urugvajo ..	460
Aŭstrujo ..	16,789	Kanado ..	360
Jugoslavujo ..	14,138	Sud-Afriko ..	290
Italujo ..	12,702	Hispanujo ..	276
Polujo ..	9,721	Hindujo ..	253
Danujo ..	9,107	Ceteraj lokoj ..	639
Usono ..	7,086		
Finnujo ..	6,390	sumo ..	4,132,085
Argentino ..	6,248		

Okupoj

Artistoj ..	2,070	Navigaciistoj ..	1,126
Delegitoj Komunumaj	518	Parlamentanoj	249
Dentistoj ..	576	Policistoj ..	2,362
Desegnistoj ..	2,122	Presistoj ..	3,266
Dommastrinoj	45,200	P.T.T.-istoj ..	8,951
Edukaj Aŭtoritatuloj	1,148	Religiistoj ..	1,518
Elektristoj ..	3,026	Sciencistoj ..	1,198
Farmaciistoj ..	1,300	Sindikataĉefoj ..	458
Farmistoj ..	10,582	Soldatoj ..	3,368
Hotelistoj ..	1,724	Studentoj ..	32,634
Inĝenieroj ..	13,815	Ŝoforoj ..	2,357
Instruistoj ..	29,322	Ŝtatoficistoj ..	7,755
Juristoj ..	1,756	Teksistoj ..	1,369
Jurnalistoj ..	1,182	Transportistoj ..	357,803
Komercistoj ..	58,419	Urboficistoj ..	3,703
Konstruistoj ..	6,392	Vendistoj ..	9,140
Kuracistoj ..	4,449	Vestistoj ..	6,196
Laboristoj ..	22,371	Diversaj ..	3,458,217
Lingvistoj ..	1,525		
Metiistoj Diversaj	22,918	sumo ..	4,132,085

Kolektivaj subskriboj ricevataj dum la pasinta monato :
(ni listigas nur tiujn kun mil aŭ pli) :

Die Naturfreund, Landesgruppe Nord-Württemberg, Germanujo	12,000
Gelaborista Ligo de Islando	24,000
Vlaamsche Jeugdherbergcentrale (Flandra Junularorganizo) Belgujo	19,805
Bergens forenede Arbeiderparti (Laborista partio en Bergen) Norvegujo	8,300
Norges Laererlag (Instruista Asocio de Norvegujo)	8,000
Avholdsfolkets Fellesutvalg (Abstinencia Asocio) Oslo, Norvegujo	6,000
Instruistina Asocio de Norvegujo	2,500
Oslo Riksmalsforening (Prilingva societo) Norvegujo	1,200
Norge Fredslag (Pac-asocio de Norvegujo) ..	1,000

(Rilate la kolektivajn subskribojn, ni konsilas ne sendi ilin pro nur malgrandaj nomboj. Ni ekzemple jam ricevis kolektivon el 6! Estas pli oportune por la registrado se ili subskribas sur unuopaj folioj).

La rimarkindaj ŝanĝoj en la vicoj de la konkurantaj landoj estas forta indiko pri la granda intereso, kiun ankoraŭ

montras niaj kunlaborantoj. Tio cetere donas spicon al la amika konkurenco. Ni kaptas la okazon gratuli niajn Islandajn samideanojn pro ankoraŭ grava kontribuo, kaj ankoraŭ al la Flandra Esperanto-Ligo pro la konsiderinda rikolto el proksimume 20 mil. Ĉi tiun monaton Norvegujo bone laboris sendinte al ni 30 mil subskribojn. Al ili ni direktas gratulon kaj dankon.. La rimarkoj kiujn ni ofte faris kaj emfazis en la komenco de la kampanjo, ankoraŭ validas. Temas pri tio, ke la kolektado ne estas la sola afero ; gravas, ke per ĉi tiuj kolektivaj subskriboj, ni varbis la apogon de grandaj kaj influhavaj instancoj kies morala helpo povos esti por ni altvalora en aliaj medioj. Ni tamen profitu la kolektivajn subskribon ne nur por pligrandigi niajn ciferojn, sed ankoraŭ por enpenetri en la rondojn, kiuj tiel konkrete subtenas nian kampanjon.

FINNUJO

Esperanto en lernejoj

Sekve de tio, ke en la popol-lernejo de Alajoki apud Hämeenlinna oni ricevis permeson instrui Esperanton kiel devigan fakon, iuj instancoj sin turnis al la Administracio de Publika Eduko (fako de la Instrua Ministerio) kun peto fari ĝeneralan enkondukon en la lernejojn. La ĉefdirektoro Y. Ruutu parolis tre favore kaj interalie diris : "La problemo pri enkonduko de Esperanto estas tre interesa. Tio donus multan utilon en malgrandaj landoj, kiel Finnulo. Anstataŭ tri aŭ kvar fremdaj lingvoj oni bezonus instrui nur unu, kaj lecionoj liberiĝus por aliaj gravaj fakoj." S-ro Ruutu tamen opiniis, ke la pli vasta demando pri internacia lingvo devas esti konsiderata en la kadro de UNESKO.

La direktoro de popolinstrua sekcio, Lerneja Konsilanto A. Salmela diris, ke la Administracio jam longe konsideris la lernadon de Esperanto serioza kaj utila objekto, kies envicigon en la programon de popola lernejo, kiel libervola fako, la Lerneja Administracio neniel volas limigi. Laŭ la leĝo oni povas en la du superaj klasoj instrui maksimume du horojn en semajno iun ekstran fakon laŭ decido de la loka lerneja direkto kaj kun permeso de la inspektoro. Oni povas tial kie ajn enkonduki Esperanton laŭ tiuj kondiĉoj.

La direktoro de seminaria sekcio Lerneja Konsilanto K. Saarialho diris : " . . . Mi povis ofte konstati la utilon de Esperanto, kvankam mi mem ne estis sufiĉe energia por lerni ĝin. Plej bone mi memoras kiel foje dum eksterlanda ekskurso la Esperantistoj estis multe favorata antaŭ la aliaj partoprenantoj per la helpo de samideanoj. Mi enviis ilin precipe en Anglujo, kie mia lingvosocio tute ne povis savi min."

Li plu diris, ke li esperas ke tre multaj instruistoj havigos al si konon de Esperanto.

Oni poste cirkulis la instruistojn en Finnulo kaj uzis la ĉiusemajnan fakorganon *Opettajain lehti* por atingi 11,000 abonantojn.

Hermann Hesse :

VOJAĜMEMORO

Ni publikigas ĉi tie fragmenton el *Vojaĝmemoro* de germanlingva svisa verkisto H. Hesse, delikatsenta novelisto kaj poeto, kies laboro estis honorita per la Nobel-premio por literaturo.

Dum multaj tagoj ni ne vidis teron, nenion krom la blunigra disko de la hinda oceano ĉirkaŭe, nenion krom la arĝente kaj roze disiĝantaj svarmoj de flugantaj fiŝoj antaŭ la ŝipo kaj la sunarda ĉielo sen nebuleto, sen nubo, kaj nokte la grandega vasto de la stelaro brilanta sur malhelbluo. Poste ni venis al Kolombo, blanksiblanta ondŝaŭmo kaj ruĝa sablobordo, polvokirlaj ruĝaj stratoj, koloraj domoj trembrilantaj kun forkurantaj konturoj en la sunardo, belaj malhelbrunaj homoj malgaje rigardantaj el malgrasaj princaj vizaĝoj kaj noble sindonaj cervokuloj, flirtantaj palmoj pendantaj super ŝaŭmanta marbordo ĉirkaŭitaj de multkoloraj birdoj kaj papilioj, bluaj montaroj fantazie altetendiĝantaj. Estis kvazaŭ bela, neverŝajna sonĝo, estinta kaj malaperinta, tiu ĉi kolora Cejlono, nevera kaj fabela en la brilega koloreco de siaj aspektoj. Tiuj ĉi fortegaj kaj parte iom teatrecaj impresoj subite estis ree dronintaj kaj for; ni denove veturis sur la senlima maro, tagon post tago, nokton post nokto.

Se oni ne estis sidanta ĉe la tablo aŭ kunestanta en vespera societo, kuŝis sur ĉiu vizaĝo malgaja malpleneco kaj obtuzeco, tiu esprimo de laceco kaj supersata apatio, kiun oni renkontas ĉe ĉiuj homoj, kiuj multe vojaĝadas, kune kun la malforteco kaj nerva malfreŝeco, kiuj karakterizas ĉiujn blankulojn en la tropiko. Kviete kaj ĝentile ili ĉiuj kuŝis sur siaj ferdekseĝoj kiel en sanigejo, la blankŝuajn piedojn kontraŭ la ĉirkaŭbarilon; la globtrotuloj, la komercistoj kaj la geologoj, la brunetaj sinjorinoj el Manilo. Ili ĉiuj kuŝis kviete kaj neniu plendis, sed ĉiuj vizaĝoj estis strange estingiĝintaj; nur kelkaj infanoj, portugaloj, ĉirkaŭkuris plezure. Kelkaj junaj germanoj pasigis la duontagon en la trinkejo sub la gvido de maljuna aŭstralia kapitano kaj estis ilia kulpo, ke jam nun ni ne plu havis bieron surŝipe; ĉion ili fordrinkis; la osta klakado de ilia ĵetkubludo sonis sekretplene dum horoj tra la lukoj. Tie en la dua klaso kie oni malpli bone estis protektata kontraŭ la suno kaj kie oni plidense kunkaŭris, oni vidis nur lacajn, malamikajn vizaĝojn rigardegi malplene kaj enue en la marvaston. La oficiroj kaj ankaŭ la maristoj suferis pli malmulte pro la soleco kaj varmego; ili ne estis senlaboraj survoje en la dezerto, ili estis sur sia ŝipo, sia hejmo, kaj havis sian deĵoron. Por tiuj maristoj la malproksimaj

malhelaj marbordoj kaj la grandaj havenurboj de Azio ne estis lokoj de espero, de zorgo kaj danĝero, sed nur ekzotaj malpurejoj, kies tuŝon ilia pura ŝipo apenaŭ volis toleri kaj kies postsignojn post ĉiu elveturo oni rapidege forbalais de la ŝipo per tukoj, brosoj kaj akvoŝluoj.

Iun matenon mi apogis min ĉe la ŝipbarilo, melankolie dediĉite al la vasteco kaj la malgajeco de la grandega malplena horizonto; nenio krom la malhela cirkloronda maro en sia terura senlimeco, supre la soleca, malamike brulanta suno kaj meze perditaj rampanta nia eta ŝipo! Ke tie, kien nia okulo ne atingas, kuŝas Hindujo aŭ Ĉinujo, estis sen signifo; nia realeco konsistis sole el tio, ke ni kiel vojperdinta malgranda ĉiela korpo solece flotis tra la vasto.

Jen iu metis manon sur mian ŝultron, brunan haran manon kun maldikaj rezistemaj fingroj kaj du orringoj; mia amiko Stevenson ridetis al mi, la plej maltrankvila kaj plej obstina mondvojaĝanto, kiun mi konas. Neniam mi forgesos nian unuan renkontiĝon, kiel li, tendeneca, malhelbrune bruligita homo en paliĝinta kaj troflikita tropika vesto iutage de velbarko en la Ruĝa Maro alvokis nian ŝipon petante surŝipigon; kiel li, kulion kun malgrandaj pakaĵoj malantaŭ li, gracie kaj rapide grimpis supren nian ŝnurŝtupetaron, kiel li kun sia makulita kaj senforma tropika ĉapelo, kaj odoranta je la tuta Afriko, eniris nian maldiligenteman, blankvestitan societon. Nun li ŝovis sian brakon sub la mian, fortiris min kaj kondukis min baborden, kie jam dekduo da aliaj pasaĝeroj staris serĉrigardante foren kun la troigita intereso de la enuo-malsanuloj.

“Ĉu vi vidas?” demandis Stevenson kaj montris foren, kaj kiam mi rigardegis dum kelktempo streĉe, mi vere vidis ion, vidis ion senforman kaj malrealan malproksime, sed tamen ion, kio sendube ne estis akvo.

“Ĉu tero?” mi demandis surprizite.

“La Nikobaroj” li kapjesis.

“Ĉu la Nikobaroj?” Tio estis sono, kiu subite remetis min en la malheletan klasĉambron de nia urbeto latinlernejo, kie mi kiel knabo iam estis riproĉata de la instruisto ĉar mi ne sciis la vorton *Nikobaroj*, la nomon de tiu insulgrupo al mi tute indiferenta, kiu kuŝis norde de Sumatro kaj sude de la golfo Peguo kiel vico de malgrandegaj punktetoj sur la landkarto.

Neniam poste mi pensis pri tiuj perditaj insuloj, verŝajne mi neniam plu aŭdis aŭ elparolis

ilian nomon ; se la riproĉoj de tiu jam delonge mortinta instruisto ne estus elparolitaj, mi hodiaŭ tute ne plu sciis ĝin. Sed jen mi nun subite vidis nekonatan peceton de plej fremda tero, kies malklaran bildon sur nia lerneja landkarto mi ankoraŭ povis imagi, kuŝi antaŭ mi en senduba realeco, ja tre malproksima kaj malgranda, sed kun iom post iom plifortiĝantaj konturoj. Insulon ĉe insulo, sube ligitaj, supre fenditaj en montĉenojn kaj krutajn pintojn. Jen tio estis la Nikobaroj !

“Ĉu vi iam estis tie?” mi demandis mian amikon.

“Ne, ĝis nun tie ne estas io farinda por mi.”

Ni rigardegis transen, delikatforme staris la pintoj.

“Jes”, mi diris, “ĉu ne vere estas io stulta kaj malgajiga, vojaĝi tiel multe? Vi ja estis ĉie, vi rakontis al mi pri Texas kaj Borneo, pri Madras kaj Saĥalin. Ĉu ne estas vere abomene ĉiam denove kuŝi sur ŝipoj dum tiom da tagoj kaj kraĉi en la maron, apud lacaj kaj malenergiaj homoj, inter fremdaj marbordoj, ĉiam ĉirkaŭ la terglobo, kiu fine devas fariĝi malgranda kaj senvalora al vi?”

“Jes”, li diris ridetante, “kelkfoje estas enuige. Sed oni ja havas sian laboron. Mi jam trovis petrolon, plumbon, kaj stanon en ĉiuj mondpartoj. Kio estas intertempe, tiuj ĉi vojaĝtagoj, ili nature ĉiam estas la samaj. Sed kiam mi ekvojaĝas sur Borneo kun dudek-tridek kulioj aŭ devas rajdadi en Sud-Afriko dum du-tri semajnoj tiam la enuo ĉesas. Ja ĉiuj homoj tiel spertas, mi pensas. Vi, ekzemple, ja diris al mi, ke vi estas verkisto. Nu vi do labore enpenetras ion, kio ŝajnas grava aŭ bonhumora al vi, furiozas en ĝi, elĉerpiĝas pri ĝi ; kaj poste la laboro estas preta, vi estas laca kaj malplena, la streĉa intereso estas for, la mondo aspektas griza kaj jen vi sidas kaj demandas vin, ĉu la tuta vivo estas vere vivinda. La vojaĝantoj simile kondutas ĉi tie. Sed nur atendu ĝis Singaporo aŭ Ŝanhajo, tiam vi vidos la samajn homojn subite streĉiĝi kaj firme stari antaŭ pakitaj kofroj kaj subite denove funkcii energie kaj mirinde.

“Eble,” mi konsentis, “sed senhejmaj ili tamen estas. Ili havas siajn gepatrojn kaj infanojn, siajn edzinojn kaj amikojn en Londono kaj Amsterdamo, kaj ĉi tie en Singaporo ili posedas nur la kapitalon, kiu ligas ilin.”

Stevenson ridetis. “Vi ankoraŭ estas komencanto pri la vojaĝado. Ĉi tiu tropika ŝiplaceco ŝajnas al vi serioza malsano. Sed ĝi efektive estas nur la libertempo al kiu neniuj sana homo povas alkutimiĝi, eĉ ne kiam li pretekstas sopiri al ĝi. Oni ne konsideru tion serioza.”

“Sed tio estas ankaŭ la senhejmeco”, mi diris.

Li tiris la ĉapon malalten sur la brunan frunton kaj diris: “Amiko, vi eraras. Hejmo estas io, kio ne ekzistas. Homo posedas sian hejmon en sia laboro kaj nenie aliloke. Kaj kie li faras ion bonan, li faras ĝin pro ĝi mem, kaj eĉ se li kredas ke li faras ĝin pro sia familio aŭ pro sia nacio, tio estas nur imago. Ĉion, kion ni faras, ni faras por la homaro kaj nia rekompenco konsistas en tio, ke ĝi ofte ĝojigas nin multe. Ni viroj, kiuj faras ion, estas ĉiuj fratoj kaj kolegoj sur la tero. Tiel longe kiel vi apartenas al tiu ĉi socio hejmeco ĉirkaŭas vin. Ankaŭ ni du estas kamaradoj. Vi helpas maturigi kaj disvastigi ideojn ; mi helpas movi la materion kaj krei laboron. Pri sentoj mi sendube scias pli malmulte ol vi, tio ne apartenas al mia fako. Sed vidu, tiu ŝipa hejmsopiro pri kiu vi parolis, tio ne estas sento pri kiu oni parolu kaj kiun oni flegu. Fakte, tio estas ne sento, sed nura sentimentalajo”.

Li ne diris al mi ion novan, tiu ĉi lerta viro, sed la admono venis ĝustamomente.

Stevenson forlasis nin jam en Penango. Mi ankoras vidas lin ; la dratecan ulon, kiel li jam de la ŝipo kriis siajn anglajn kaj malajajn ordonojn surborden kaj poste, kun la senforma tropika ĉapelo sur la akcipitra kapo, malaperis sur rikiŝo en la svarmanta ĉina urbo.

Kun permeso de la aŭtoro trad.

Werner Simon, Usono

Embaraso

Juna virino, kiu antaŭ nelonge malfermis infanan lernejon (infangardenon), sidas en tramo kaj kapkline salutas sinjoron. Tiu reciprokas la saluton, sed evidente li tute ne konas ŝin.

Rimarkinte sian eraron ŝi diras: “Pardonu, sinjoro, sed mi erare kredis vin patro de du el miaj infanoj ! . . . ”

Ĉe la proksima haltejo ŝi eliris ruĝvange.

Miskompreno

Urba junulo estis komisiita, fari inventaron de kampara farmo. Li ne havis iun ajn praktikon en tiu speco de laboro, tamen li sukcesis fari liston de ĉiuj mebloj kaj havaĵoj, ĝis fine li venis al besto, kiun li tute ne povis identigi, . . . kapro.

Do li telefonis al sia estro en la urbo: “Kiel vi nomas tiun aĵon, kiu troviĝas ĉi tie? Ĝi surhavas malglatan veston, kelkloke eluzitan, blankan barbon kaj longan malgajan vizaĝon . . . ”

“Stultulo,” diris la estro, “tio ja estas la farmisto !”

LA SITELO

“Ne, ne,” diris kolonelo Taylor, “la burokrateco tute ne estas novaĵo. Jen kion mi spertis dum la antaŭa mondmilito.

En Aŭgusto de la jaro 1916, kiam mi estis kun mia bataliono en Francujo, mi ricevis ordonon anstataŭi majoron Smith, la komandanton de la “C” roto, kiu estis forpermesota Britujon. Mi estis komandanta la “C” roton ĝis lia reveno. Mi kompreneble plenumis la ordonon, kaj Smith transdonis al mi necesajn detalojn pri sia roto. Fine mi devis subskribi dokumenton, ke la tuta ekipaĵaro kaj provizoj estis ricevataj kompletaj.

Kompreneble mi ne volis pasigi tutan tagon kontrolante provizaron; do, kiam Smith garantiis, ke nenio mankas, mi subskribis la dokumenton.

La saman nokton mi estas vundita kaj forsendita en hospitalon.

Post du monatoj mi ricevis leteron en oficiala koverto. Ĝi estis de la Milita Ministrejo kaj en ĝi oni klarigis al mi, ke mi devas pagi unu ŝilingon kaj dek unu pencojn por unu sitelo perdita dum la periodo kiam mi komandis la “C” roton.

‘Ne gravas la mono,’ pensis mi, ‘sed jen maljusteco. Mi batalis pro la patrujo, ricevis vundojn, kaj anstataŭ sendi medalojn oni sendas pagordonon pro ia malbenita sitelo.’

Kaj senprokraste mi skribis responde al la Milita Ministrejo, ke mi ne volas pagi la sumon pro tiaj kaj tiaj kialoj.

Nenio okazis dum la sekvinta monato. Iun Novembran tagon, kiam mi ŝakludis kun mia hospitala kunulo, kapitano O’Connor, oni alportis grandegan koverton, adresitan al mi, de la Milita Ministrejo. Miregite mi malfermis ĝin kaj ekvidis amason da diversaj dokumentoj kaj raportoj, ĉiuj pruvintaj, ke mi estas responde pri la perdo de unu sitelo, kies kosto estas unu ŝilingo kaj dek unu pencoj.

‘Kio okazis?’ demandis O’Connor.

Mi rakontis la tutan aferon.

‘Tio estas via propra kulpo’, opiniis O’Connor, ‘ĉar vi ne scias kiel funkcias Ministrejo. Kiam iu skribisto de la Ministrejo sendis la unuan leteron al vi, li enmetis la kopion en dokumentujon, kaj li neniam klopodus elpreni ĝin; kaj se vi ne estus skribinta vian malbenitan leteron citanton la rilatan kodnumeron, vi certe neniam reaŭdis pri ĉi tiu afero. Ne, ne, oni devas neniam respondi oficialan leteron.’

‘Eble vi pravas,’ diris mi.

‘Certe,’ respondis O’Connor. ‘Mi ja havis similan sperton. Sed ne pro bagatela sitelo.

Antaŭ dek ok monatoj mi perdis ses malbenitajn ŝarĝ-veturilojn, kaj mi laŭe ricevis leteron de la Ministrejo. Sed mi ankaŭ laŭe tute ne respondis, kaj mi ne ricevis ion plu rilate al la afero ĝis hodiaŭ. Sendube la kopio ankoraŭ estas en la dokumentujo kaj verŝajne tie restos ĝis iu estonteca historiisto ĝin eltrovos. Kaj nun mi ne ĝenas min’.

‘Jen imitinda metodo,’ mi ekkriis entuziasme.

‘Kun via permeso mi povas facile solvi vian aferon por vi,’ respondis la ĉiam helpopreta O’Connor.

‘Volonte,’ mi diris. ‘Mi riskas nenion; en la plej malbona okazo mi devos pagi unu ŝilingon kaj dek unu pencojn’.

‘Bone! Alportu grandan koverton,’ ordonis O’Connor al hospitala servisto.

‘Kion vi intencas?’ mi demandis.

‘Vi vidos,’ respondis gravmiene O’Connor.

La servisto alportis la koverton. O’Connor zorge enmetis la dokumentaron, fermis la koverton kaj skribis sur ĝi:

‘Oni ne malfermu ĉi tiun koverton ĝis post mia morto.’

Estas nekredeble, sed O’Connor pravis; mi ne ricevis ian pluan leteron aŭ dokumentaĉon pri la perdita sitelo. Kaj bedaŭrinde mi ne scias kiu pagis la ŝilingon kaj dek unu pencojn,” finis ridetante kolonelo Taylor.

Henryk Minc.

Represita, kun permeso, el “Premiaj Romanetoj”.

La plej maldiligenta

La kompanio troviĝis en malgranda garnizon-urbo. La servo estis facila, sed eĉ tion la soldatoj ne volonte plenumis. La kapitano konvinkiĝis, ke ŝajne lia kompanio estas la renkontejo por la maldiligentuloj de la tuta armeo. Li riproĉis kaj punadis, sed ĉio vane.

Fine li volis kapti siajn subulojn de alia flanko. Li parade starigis ilin kaj alparolante montris plenan cigarkeston: “Mi fieras, ke inter vi estas la plej maldiligenta soldato de nia glora armeo. Mi volas doni al li tiujn cigarojn kiel premion. Atentu! Kiu opinias, ke li estas la plej maldiligenta, tiu paŝu antaŭen!”

Kiel unu longa linio la tuta kompanio antaŭen-paŝis; nur unu sola viro ne movis sin. “Kial vi restas staranta?” demandis la kapitano. “. . . tro maldiligenta, sinjoro kapitano,” lace respondis la soldato. “Jen prenu la premion!”

ENIGMA KONKURSO N-ro 29

Solvojn oni sendu al S-ro P. H. Mooy, 106 rue Général Lotz, Brussel-Uccle, Belgujo.

Solvoj de la enigmoj en Konkurso N-ro 27.

N-ro 61: Ĉiun, kiu solvas ĉi tiun enigmon, mi petas skribi al mi por ke mi sciu, kiom da membro-abonantoj interesiĝas pri la enigmoj.

N-ro 62: I. galop - amara - latun - orumi - panik
II. palis - aromi - lojal - imagi - silik
III. kares - aperi - regal - erara - silab
IV. lapis - avizo - pilol - izole - solen
V. balen - avino - limit - eniri - notis

Gajnis la premiojn post kontrolo de la 25-a konkurso: S-ro J. Beau (Franc.) 111p., S-ino N. Koudijs-Modoo (Ned.) 109p., S-ro C. Graversen (Dan.) 109p.

Enigmo N-ro 65: Silab-Enigmo. El la ĉi-subaj 157 silaboj formu 41 vortojn, kies triaj kaj sesaj literoj formas en la donita sinsekvo la lastan strofon de konata poemo de D-ro Zamenhof. (La unuan literon de tiu strofo mi forlasis).

a - a - a - a - a - ak - ar - ba - ba - bul - ce - ci - ci - co -
coj - ĉi - ĉo - ĉo - de - de - di - di - di - do - do - dro - dro -
e - fe - fi - fi - fo - fo - for - gi - gi - gi - gla - gra - gu - ĝi -
hi - ja - ja - je - jo - ka - ka - ka - ka - kar - ki - ko - ko -
ko - kom - kom - kon - kon - kramp - kre - kri - kro - la - la -
la - la - le - li - lis - lo - lo - lo - lo - lo - lo - lo - lo - lo -
lo - lu - ma - ma - maj - man - man - me - men - mi - mo -
mo - mo - mo - na - nan - ne - ni - nis - no - no - no - o - o -
o - o - o - o - pa - pa - pe - pe - per - pi - pli - pli - po - po -
pre - pre - pre - pre - pro - ra - re - ri - ri - ro - ro - ro - ro - ro -
sa - sa - se - se - se - so - so - stan - su - ŝpru - ta - te - te -
ten - to - to - to - to - tra - trans - tri - tri - tro - tro - vi.

La signifoj de la vortoj estas: 1. Multaj deziras tion, sed ne ĉiam tio donas feliĉon. 2. Batalanto kontraŭ homo aŭ besto en la cirkoj de antikva Romo. 3. Kuniĝo de personoj kune direktantaj komercan aŭ industrian aferon. 4. Liberigi el la patra aŭ kuratora povo. 5. Hebrea prapatro kaj gentestro, kies vivo ĉiam estis tre longa. 6. Dentoforma aperturo ĉe la supro de muro, tra kiu oni pafas. 7. Plej granda arĉa instrumento. 8. Rondo ventroforma ujo el lignaj kurbaj tabuletoj enhavanta nigran gluan substancon. 9. Eraro pri dato de historiaĵo. 10. amasbuĉi. 11. Privilegio donarta al iu ekskluzivan rajton vendi ion. 12. Meti en alian lokon. 13. Senŝanĝa. 14. Lando en Azio. 15. Lubrikilo. 16. Bongusta nutraĵo, dum la milito ne havebla. 17. Nenormale mallonga vidkapablo. 18. Gratulaj flataj vortoj adresataj al iu. 19. Rajto donita al kreditoro pri nemovebla havo kiel garantiaĵo de iu ŝuldo. 20. Postuli ion, pri kio oni asertas, ke oni havas rajton super ĝi. 21. Monaj rimedoj. 22. Neĉefa, malprecipa, flanka. 23. Aspekto de vizaĝo flanke rigardata. 24. Kvarpieda besteto similanta lacerton. 25. Reĝa krono. 26. Cervoparenca remaĉulo. 27. Perioda informilo de societo. 28. Antaŭludo al muzika verko. 29. Necesa por lernantoj. 30. Parto de la jaro. 31. Speco de spasma kun subita kuntiriĝo de muskoloj. 32. Aganta konforme al la leĝoj de honoro. 33. Pliami, pliŝati. 34. Metala kuirpoto kun tenilo. 35. Vegetaĵo el familio umbelacoj uzata kiel spicaĵo. 36. Aparato por transformi la proprecojn de elektra kurento. 37. Mezuro de longeco. 38. Arto ekkoni la karakteron de iu per ekzameno de lia skribado. 39. Politika doktrino de la partianoj de la reĝeco. 40. Cilindra ujeto el kartono entenanta pulvoŝargon kaj plumberojn. 41. Maldelikata.

Enigmo N-ro 66: Perditaj proverboj. Ordigu la sekvantajn litergrupojn tiel, ke aperos kvin proverboj el la *Proverbaro Esperanta*.

1. as - ato - ird - kas - lak - ngi - obe - otrseb - vek.
2. ado - del - hak - ign - lig - nas - ner - odo - ojn.
3. cok - ien - kaj - lab - nco - ond - oro - pac - pòte - sal - uka.
4. ajt - alĉ - ame - ees - en - iod - iru - nmi - sam - sek - sen - tus.
5. asl - dao - das - enf - ero - evi - ign - kul - nen - nia - nit - oni - onn - rab - rem - vid.

Ne restu sola

En plej multaj lokoj tenas nian standardon unuopuloj. Tio ĉi validas preskaŭ ĉiam pri vilaĝoj, kie ofte la sola samideano estas la loka instruisto aŭ studento, ofte unu el la malmultaj kleraj personoj en la vilaĝo.

Sed estas ĝenerale sciate, kiel malkonstanta estas la loĝloko de la personoj apartenantaj al tiuj du kategorioj. Venas ordono de la supera aŭtoritato kaj la instruisto devas ekposteni aliloke. La studento finstudas kaj ekdeĵoras aliloke aŭ daŭrigas siajn studojn en pli granda centro. En ambaŭ okazoj ili devas forlasi sian ĝisnunan agadkampon kaj se ili antaŭe klopodis prilabori sian ĉirkaŭaĵon, informi ĝin pri Esperanto, nia movado, niaj celoj kaj la rezultoj jam atingitaj, ili devas interrompi tiun ĉi servon al la movado kaj la tereno, sur kiu—danke al iliaj estintaj klopodoj—jam post nelonge povus montriĝi ia sukceso, estas forlasata, la kulturita kampo kreskokovras sin denove per herbaĉaro kaj la farita laboro povas esti konsiderata vana. Kian domaĝon signifas por ni la translokigo de persono, kiu ĵus gvidis kurson en sia loko, mi eĉ ne devas akcenti.

Ni devas ĉiam antaŭvidi tiun ĉi eventualon kaj fari ĉion por ke ĝi nin ne surprizu. La plej bona rimedo estas *trovi kunlaboranton, helpanton*, tio signifas iun, kiu povos anstataŭi nin se ni eĉ neatendite devus forlasi nian postenon.

Por paroli pli konkrete: se vi komencas ie ajn labori por nia afero, propagandi aŭ varbi, ne komencu per ega bruoj. Komencu esploru la emon al nia movado ĉe unuopuloj, elektu unu aŭ kelkajn, se eble la plej taŭgajn kaj fervorajn, igu ilin penetri profunden en la lingvon, en ĝian spiriton kaj konigu al ili vian poresperantan laboron tiel, ke ili estu kapablaj en kia ajn tempo plene transpreni viajn taskojn kaj daŭrigi la laboron sen interrompo. Poste, kiam vi havos unu aŭ pliajn fidindajn helpantojn, vi povos komenci pli grandskalan propagandon aŭ kurson. Kaj eĉ se oni vin ne translokigos, vi vidos, kia beno estas havi helpantojn!

Eble ne ĉiam oni devas timi la ĉi tie priskribitan danĝeron. Des pli bone. Sed kie nur eblas, mi rekomendas agi laŭ ĉi tiu konsilo. La rezulto estas malpli impona, sed pli certa. Multon da sukceso!

EVT. laŭ artikolo en
Esperantisto Slovaka

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Centra Oficejo : Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo
OFICIALA INFORMILO

N-ro 207

3an de Junio 1948

Nova Komitatano.

F-ino N. Gropuzzo, Harambašićeva 19, Zagreb,
Jugoslavujo.

DELEGITOJ

Belgujo

Blankenberge. D : C. Decorte-Caty, Avenue Charles
Deswert 53.

Bruxelles. FD (Bankaj aferoj) : J. Oleffe, 22 Avenue de
l'Aigle, Woluwe-St. Pierre. Tel : 338859.

Britujo

Handforth (Cheshire). FD (Filatelo) : B. Gateshill,
4 Marlow Drive.

Ĉeĥoslovakujo

Chomutov. VD : R. Tuma, Škroupova 28.
FD (Fotografio) : La VD.

Germanujo

Bad Oeynhausen (21a). D : D-ro E. Happe, Walderseestr. 4.
FD (Instruado) : La D.

Hungarujo

Győr. FD (Instruado) : G. Nyerges, Wennes Jenő-utca 49.

Kanado

Windsor (Ontario). D : B. Collier, 1913 Dominion
Boulevard. Tel : 4-0382.

Svedujo

Lidköping. D : Å. Blomberg, Lottkällsgatan 2.
Stockholm. FD (Virinaj aferoj) : F-ino E. Nyberg,
Bergsundsgatan 16-2tr. Tel : 402559.

ŜANĜOJ.

Belgujo

Bruxelles. FD (Turismo ; Katolikismo) : nova adreso :
Konijnenperken 109.

Brazilo

Rio de Janeiro. VD : nova adreso : Postal 5117, Caixa.
FD (Komerco) : kiel supre.

Britujo

Reading. FD (Maristaj aferoj ; Mondfederalismo) : vakas.

Francujo

Cannes. D : Nova adreso : 3 Rue Léopold Bucquet.

Germanujo

Bielefeld. D kaj FD (Instruado) : vakas.

Italujo

Bologna. D : nova adreso : Via Matteotti 5.

Maroko

Casablanca. FD (Sporto) : nova adreso : ĉe Association
Espérantiste du Maroc, Place Mermoz (Immeuble
Chicot).

DUMVIVA MEMBRO

S-ino W. M. S. Jones, Cheltenham, Anglujo.

DONACO. J. Oelen 3ŝ. 6p.

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1948

- 307. S-ro H. Boffejon, Antwerpen, Belgujo.
- 308. S-ro P. Denis, Clermont en Argonne, Francujo.
- 309. S-ro H. Kosla, Warszawa, Polujo.
- 310. S-ro W. Odolanski, Piotrkow-Tryb., Polujo.
- 311. S-ro R. Dobrzanski, Sosnowiec, Polujo.
- 312. S-ro G. S. Boscarino, Ragusa, Italujo.
- 313. S-ro E. Zumbo, Firenze, Italujo.

Sinceran dankon al ĉiu helpanto.

Jarlibro. La unua parto de la jarlibro eliris ĉirkaŭ la
10a de Junio. Se iu membro ne ricevis ĝin, li bonvolu
informi la Centran Oficejon por ke oni esploru la aferon.
Ĝi devus esti preta jam en Aprilo, sed oni devis atendi por
ricevi la paperon.

C. C. GOLDSMITH, *Sekretario*

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Serva Centro kaj Redakcio : Palais Wilson, Genève,
Svisujo.

Interhelpo : Ni jam informis, ke manko de rimedoj ne
permesas al ni helpi kiel ni volus. Ni tamen por Pasko
povis sendi al aro da samideanoj en suferantaj landoj kafon
kaj enskatolan lakton, danke al la donaco de kelkaj svisaj
samideanoj. Ni esperas povi daŭrigi tion.

Personoj, kiuj petas medikamentojn, bonvolu memori,
ke diversajn specialaĵojn, precipe germanajn, ni ne trovas.
Konsilinde estas citi duan, kiu povus anstataŭi tiun
deziran. Plej bone estus sendi recepton de kuracisto,
laŭ kiu ni povus agi.

Pri elmigro el Eŭropaj landoj : la kondiĉoj pri elmigro
kaj enmigro estas tiaj, ke ni prefere silentu ! La Serva
Centro havas okazon intime kontakti kun ĉi tiu problemo
ĉar ĝuste en Palais Wilson sidas la plej grava aŭtoritato
pri tio. Venkinte la unuan baron—la rajton enmigri en
iun landon, oni devas venki la duan—trovi la financojn
por pagi la vojaĝon kaj la kelkmonatan transiran tempon.
La tria baro estas ŝiploko.

Fakvortaroj : La intereso pri tio estas atentinda se oni
juĝas laŭ la aro da respondoj kaj sugestoj kiuj venas al
la redakcio. En venonta numero ni resumos tiujn
respondojn kaj donos direktivojn por estonta laboro.

Redakcio : Ni informas niajn kunlaborantojn, ke
tekstoj kiuj devus aperi en difinita numero, devas atingi
nin plej malfrue la 29-an de monato por aperi en
postsekvanta numero. (Ekzemple, teksto por Julia
numero devas esti en Genevo la 29-an de Majo).

Bibliografio : La Biblioteko de U.E.A. estas denove
arangata. Ĝi restis de 1940 en kestoj, kaj pro manko de
helpantoj kaj de spaco ni ne povis pensi pri lokigo de
bretaroj. Ni ĝojas anonci, ke danke al bonvola helpo ni
povis komenci ci tiun necesan laboron, kaj post kelkaj
monatoj ni esperas esti pretaj por rekomenci la biblio-
grafian laboron interrompitan post 1933.

Ni petas la eldonistojn, ke ili sendu al la Bibliografia
Servo, (adreso : Universala Esperanto-Asocio (por Biblio-
grafio), Palais Wilson, Genève, Svisujo) unu ekzempleron
de ĉiu libro kiu aperos.

Ni serĉas libervolajn helpantojn por prilabori la
bibliografion de Esperanto, samideanojn prefere loĝantajn
en Svisujo. Tio estas interesa laboro, sed bedaŭrinde
mankas mono por dungi salajratan helpanton.

Genève, 30-an de Majo, 1948 *Hans Jakob, Estrarano*



**LA
DUA
LINGVO POR ĈIU
SED POR ĈIUJ LA SAMA**

Jenan kaj aliajn efikplenajn

E-varbstampilojn

vi ricevas en ĉiu dezirata lingvo !

Prezo : 4 ŝil. aŭ 16 rpk. inkluzive afranko

Mendu ĉe

Waldemar Reinhold

Esperanto-Varbiloj

Johanniterstr. 84

(22a) Duisburg (Germanio)

Vian pagon direktu al UEA !

Jen libro, kiu certe plaĉos al ĉiu !

**MORTO
DE TRAJNO**

de

Freeman Wills Crofts

Tradukita de

Mason Stuttard

La priskriboj de fervoja funkciado estas
brilaj ; la rakonto mem estas ege interesa.

256 paĝoj. Bindita 9 ŝil, afranko 6p.

Eldonita de

ESPERANTO PUBLISHING CO. LTD.

Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

**KORESPONDA KURSO
POR EDUKADO DE LA VOLO**

Tiuj kursoj, france kaj esperante redaktitaj, ebligas
al iu minimumon da taga disciplino, la trans-
formadon de la vivo, la realigadon, iom post iom,
de lia ambicio, de lia idealo.

Skribu al la sekvanta adreso :

LA VIE HEUREUSE,

40 Avenue de la Motte-Piquet, Paris 7, Francujo.

TUTMONDA JUNULAR-ORGANIZO

ekzistas 10 jarojn. Tiukaze aperis 16-p. ilustrita,
propaganda broŝuro, kiu enhavas detalajn informojn
pri la estiĝo kaj disvolviĝo de T.J.O. kaj Denaska
Esperantistaro, statuton de T.J.O., kaj liston de
perantoj. Ĉiu, kiu vere interesiĝas pri la junular-
laboro nepre mendu la broŝuron ĉe

TJO-CENTRO

West Graftdyk, Nederlando

Prezo : 5 pencoj aŭ 1 int. resp. kupono



Tatra

TATRA—ŝaŭmigilo, la pulvoro, el kiu vi facile, simple kaj tuj
preparos bongustan, dolĉan, ŝaŭmetantan TRINKLIMONADON.
Mendu skatolon, kiu enhavas 35 porciojn kun recepto en Esperanto.
Kontraŭ antaŭpago 15 rpk. aŭ egalvaloro ekspedas ĝin rekomendite :

JAROMÍR PAVLACKÝ

Veselí nad Moravou, Ĉeĥoslovakujo.

Se vi deziras pagi aliamaniere (per Esperantaj libroj, varoj, k.t.p.),
petu senpagan prospekton. Liverebla en la tuta mondo.
(Nur en Germanujo mi ne havas provizore liverpermeson).



Muziko per Esperanto

Ludu
post 3
monatoj

Same kiel la naciaj lingvoj, kiuj historie formis sin,— ankaŭ la primitiva muzikskribo estas tute nenecese treege komplikata, nepraktika, kaj malfacile lernebla.

Ĝisfunda, scienca ekzameno, kaj eksperimentado per miloj da muziklernantoj de ĉiu speco, rezultis en la nova muzikskribo "Klavarskribo" kiu jam havas mirigan sukceson en diversaj landoj.

Klavarskribo ebligas:

- pli rapidan progresadon
- pli facilan kaj pli agrablan studadon
- multe pli altan finan nivelon
- sukceso por ĉiuj studantoj
- multe malpli da elspezoj

Centmiloj da muzikamantoj jam ludas per Klavarskribo, kaj ĉiu muziko kiu ne estas preskaŭ tute nekonata, jam estas havebla en la nova skribo; ankaŭ la plej eminentaj verkoj de la grandmajstroj, piano- kaj violonkonĉertoj, oratorioj, la nova filmmuziko kaj la moderna dancmuziko, studmuziko, kaj etudoj ĝis la plej altaj gradoj, religia muziko, k.t.p., entute pli ol 10.000 eldonoj, inter kiuj multaj albumoj, ofte bele binditaj.

Multnombraj muzikinstruistoj en diversaj landoj jam instruas siajn lernantojn laŭ Klavarskribo. La simpleco de Klavarskribo ankaŭ ebligas sukcesplenan studadon per skribaj muzikkursoj, kiuj nun ekzistas por multaj instrumentoj en angla, franca, germana (por Svislando), kaj nederlanda lingvoj.

KONCIZA KOMPENDIO

por ludi la klavaron per Klavarskribo (Esperantlingve)
kun katalogo de pianmuziko en Klavarskribo.

Mendu je:

Klavarskribo

Londono—10a Highbury Place, N.5; sh. 3

Antverpeno—Valkenburgstraat 34; Fr. B. 25

Nancy—100 Rue Saint-Dizier; Fr. F. 125

Basel (I5)—Weiherhofstrasse 59; Fr. Sv. 2.50

Slikkervero (Nederlando)—Flor. 1.25

Kingston (Mass.), Usono—Wapping Road; \$0.60

Pretoria (Sud-Afriko)—Priv. Bag 45; sh. 3

KLAVARSKRIBO ESTAS LA ĜENERALE UZOTA MUZIKSKRIBO — DO LERNU ĜIN JAM NUN!

FILATELA BORSO DUM LA U.K.

Dum la U.K. en Malmö I.A.P.K. havos fakan kunvenon kaj krome ĝi intencas aranĝi borson. Ĉiuj I.A.P.K.-anoj nepre kunportu poŝtmarkojn por tiu aranĝo. Ni kompreneble scias, ke pro oficialaj dekretoj ne estas eble kunporti el iuj landoj poŝtmarkojn en la eksterlandon; sed certe estas multaj membroj kiuj povos tute laŭleĝe kunporti materialon, kaj se la svedaj membroj interesiĝos la sukceso de la aranĝo estos garantiata.

La Estraro de I.A.P.K. intencas unue aranĝi AŬKCION. Oni liveros al la aŭkciestro unuopajn aŭ pluropajn poŝtmarkojn kaj oni rajtos fiksi minimuman vendprezon. Se la prezofertoj ne atingos tiun minimuman prezon, la posedantoj rericevos la markojn.

Due, oni aranĝos interŝanĝadon. Kiam tiom da diversnaciaj samideanoj kolektiĝas en unu loko estas bonega okazo por interŝanĝo kaj oni tiel povas plibeligi sian kolekton.

Sed, kara kolego, la bona rezulto, la sukceso de ĉi tiu aranĝo **dependas de vi mem.** La Estraro de I.A.P.K. povas nur iniciati kaj disponigi la rimedojn. La membroj mem devas fari la reston. Per via kunlaboro kaj helpo (kiu cetere donos al vi individuan profiton) vi povos doni al la kunvenintaj kongresanoj lecionon pri la praktika aplikado de Esperanto en faka sfero.

Do, jam nun elserĉu vian interŝanĝmaterialon. Trovu la plej taŭgan kaj plej interesan. Tiel vi certe garantios al vi interesan kaj sukcesan kunvenon en Malmö.

**Internacia Asocio de Poŝtmark-Kolektantoj,
XPDO, Didcot, Berks., Anglujo.**